IPR
INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031

Jarkolekto 35 - trimonata
05/4

Redakta komitato:
Jozefo Németh (red.)
Katalin Kováts (vicred.)
Luiza Oberrauch Madella
Iwona Kocieba

Kunlaborantoj:
Sjoerd Bosga
Aida Cizikaite
Ronald Glossop
Tieko Isikawa
Tereza Kapista
Márta Kovács
Stefan MacGill
Radojica Petrovic
S.P. Smits





ilei
Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Ronald GLOSSOP: *La kulturo de Esperanto* 3
R. PETROVIĆ: *Kultura kaj lingva diverseco en edukado – evolutendencoj* 6
Márta KOVÁCS: *Esperanto en la abiturienta sistemo de Hungario* 12
Ni konferencis en Kaunas... (S.P. SMITS) 18
Tago de la Lernejo dum UK 21
El la landoj kaj sekcioj (BE, BI, DE, JP, US) 26
Leterkesto (Renato CORSETTI) 30
Por via notlibro (Juna amiko, Internacia Infana Kongreseto, FIPLV) 31
La 39-a Konferenco de ILEI en Parmo, Italio (informilo) 33
+ suplemente: *aliĝilo por la Konferenco*

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Radojica Petrović, *Bul. oslobodjenja 36/14, SCG-32000 Čačak, Serbio. Tel. (+381) 32371053. Fakso: (+381 32) 342101, <radp@ptt.yu>*
Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto Interkulturo.

Vicprezidanto: Stefan MacGill, *Pannonia u. 30. I/6, HU-1136 Budapest, Hungario. Tel. (+36 1) 349-5207, <Stefan.Macgill@gmail.com>*
Juna amiko, lerniloj, Internacia Infana Kongreseto (komisie de UEA)

Sekretario: Atilio Orellana Rojas, *Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel. (+31 70) 3556677, fakso: (+31 70) 358 4422, <iei001@tiscali.nl>*

Vicsekretario: vakas

Estrarano pri financoj: Sjoerd Bosga, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel. (+46 21) 41 70 45, <sjoerd@esperanto.se>*


Estrarano: Aida Čižikaitė, *Zamenhofo g. 5, LT-44287 Kaunas, Litovio. Tel. (+370) 37 208503. <aidute@mail.lt>.*
Konferencoj.

Estrarano: Mauro La Torre, *Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio. Tel.: (+39) 06 44 62 092 aŭ 06 49 57 805, fakso: (+39) 06 49385673, <mauro.latorre@uniroma3.it>; http://host.uniroma3.it/docenti/latorre/*
Universitata kaj scienca agadoj.

Estrarano: Hokan Lundberg, *Fisksatra Torg 12, SE-133 41 Saltsjobaden, Svedio. Tel. (+46) 8 717 78 69,<hokan@ikso.net>*
Retprojektoj kaj junulara agado.

Titolpaĝe: seminarioj en Germanio (supre) kaj Belgio (sube) vd. p. 26, 28

Ronald Glossop:
LA KULTURO DE ESPERANTO[1]



Ĉu Esperanto havas kulturon? Se jes, kio estas ĝia karaktero? Kiuj estas ĝiaj eroj?

Kelkaj homoj, aparte tiuj kiuj kontraŭas E-on, insistas, ke E-o ne havas kulturon. Tial ĝi ne estas vera lingvo kiel la naciaj lingvoj. Ŝajne tiuj homoj ne povas kompreni, ke oni povas havi kulturon, kiu ne estas nacia kulturo. Ili pravas, ke E-o ne havas nacian kulturon, sed tio ne signifas, ke E-o ne havas ian kulturon. Esperanto ja havas kulturon, sed ĝi estas internacia aŭ tutmonda kulturo.

Oni devas konstati, ke ĉe E-o la rilato inter la lingvo kaj la komunumo estas inversa al la kutima situacio. Kutime la membroj de komunumo loĝas kune en unu loko, kaj la uzo de ĝia lingvo estas unue nur buŝa. La skribita lingvo ekekzistas nur multe pli malfrue aŭ en kelkaj kazoj neniam. Male E-o unue estas skriba lingvo, kaj oni uzas ĝin en diversaj lokoj, kiuj eble ne estas tre proksimaj unuj al la aliaj. Ĉe E-o la skribata lingvo naskas la buŝan lingvon! Iom post iom tiuj, kiuj uzas E-on, formas ne-en-unu-lokan komunumon kaj komencas konstrui ankaŭ novan specon de nenacia kulturo.

En kio konsistas la karaktero de la kulturo de E-o? Kiel jam dirite, ĝi ne estas nacia kulturo, sed E-o havas internacian aŭ tutmondan kulturon. Sekve ĝi devos antaŭenigi internacian kompreniĝon kaj toleron al malsamaj vivmanieroj. Esperantistoj devas respekti la kutimojn kaj lingvojn de ĉiuj grupoj tra la tuta mondo.

La diversaj naciaj kulturoj devos esti konservataj ankaŭ en tempo, kiam nova tuttera, vastanima kulturo estos konstruata, kun novaj, specialaj terglobaj sentoj, kaj samtempe sen limigo de aliroj kaj perceptadmanieroj.

Malsimile al la situacio ĉe multaj naciaj kulturoj, la adeptoj de E-o havas nek malsaman specon de kostumoj, per kiuj vestus sin nur Esperantistoj, kiujn nur Esperantistoj surhavas, nek unikan specon de

[1] *Prezentita dum ILEI-konferenco, Kaunas, Litovio, la 4-an de aŭgusto 2005, reviziita kaj iom pligrandigita por IPR – NdlR*

nutraĵoj, kiuj estas konataj kiel nutraĵoj tipaj de esperantistoj. Male, ĉe E-o grava parto de la kulturo efektive estas la ekzisto de multaj diversaj specoj de vestoj kaj multaj diversaj specoj de nutraĵo el la diversaj mondopartoj.

Alia malsama aspekto de la kulturo de E-o estas la tendenco rigardi al la estonteco pli ol al la pasinteco. Kompreneble, ĉiu kulturo devas atenti sian historion, sed ĉe la E-komunumo, male al la kutima situacio por naciaj komunumoj, la esperoj por la estonteco estas multe pli gravaj ol la memoroj de pasintaj eventoj.

Nia respektata Zamenhof, la fondinto de Esperanto, ja nomis sin Doktoro Esperanto kaj ankaŭ liaj sekvantoj estas esperantoj.

Ankoraŭ alia aspekto de la kulturo de E-o estas la preteco uzi novajn teknikojn por vojaĝi kaj komuniki. Ĉar la koncerna komunumo ne plu estas en unu loko sed ekzistas tra la tuta planedo, membroj de tia komunumo devas uzi la plej modernajn manierojn veturi kaj sendi informon unuj al la aliaj.

Ĉar la E-komunumo estas internacia kaj tuttera, ĝiaj membroj volas kunlabori ankaŭ kun internaciaj kulturaj organizaĵoj kiel UNESKO kaj kun diversaj internaciaj ne-registaraj organizaĵoj, inkluzive internaciajn religiajn organizaĵojn. Kompreneble ankaŭ naciaj kaj landaj komunumoj ofte volus fari tion, sed ne ĉiam. Ĉe la E-komunumo tia kunlaboro estas ĉefa celo, ne nur sekundara aŭ hazarda afero.

Simile al la naciaj kulturoj, E-o havas sian literaturon. Ekzistas ne nur multaj tradukoj el gravaj verkoj de diversaj naciaj kulturoj, sed ankaŭ originalaj verkoj de diversaj specoj. Kelkaj el la pli konataj aŭtoroj estas L. L. Zamenhof el Pollando (la iniciatinto de la lingvo), Kálmán Kalocsay kaj Julio Baghy el Hungario, William Auld kaj Marjorie Boulton el Britio, Gaston Waringhien kaj Raymond Schwartz el Francio, Baldur Ragnarsson el Islando, Ueyama Masao el Japanio, kaj S. J. Zee el Ĉinio. (Pardonu min, ke mi ne menciis multajn aliajn, sed oni devas ĉesi ie.) Efektive, ĉar E-o dependas tiom de sia skribita formo, la kvanto de la skriblingva materialo en E-o ofte estas granda surprizo al ne-Esperantistoj. Feliĉe ni havas niajn specialajn bibliotekojn, kiuj kolektas tiujn materialojn, kaj niajn vendistojn, kiuj estas pretaj vendi la novan literaturon. Oni povas konatiĝi kun la kulturo de E-o ne nur en libroj kaj amaso de magazinoj, sed ankaŭ en kantoj kaj teatraĵoj kaj per interreto, videobendoj, kompakt-diskoj, kaj elsendoj de radio- kaj televid-stacioj en multaj landoj kiel Pollando, Ĉinio, Aŭstrio, Italio, Brazilo kaj Koreio.

Krom la diversaj haveblaj skribitaj materialoj, estas kelkaj aspektoj de la lingvo mem, kiuj kontribuas al la kulturo de E-o. Ekzemple la uzo de afiksoj permesas la kreon de novaj vortoj, eĉ pere de infanoj. La prefikso "mal" indikas la kontraŭon de la sekva radiko, kaj la vorto "trinkas" signifas, ke oni prenas likvaĵon en la korpon. Tial oni povas uzi la tute novan vorton "maltrinki" anstataŭ uzi la pli kleran vorton "urini." Efektive, tiu nova vorto nun estas pli ofte uzata, aparte de la infanoj. Per la uzo de la afiksoj ĉiu ajn povas krei novajn vortojn, kiujn aliaj Esperantistoj tuj povas kompreni. Foje unu el miaj studentoj, dum ekzameno, ne povis memori la vorton "forte" rilate al la verbo "neĝis." Li lerte kreis novan esprimon "neĝis maldolĉe." Tio estas tuj komprenebla esprimo kaj eĉ iom poeta, ĉu ne? Ĉu komencantoj povas simile krei novajn bonajn vortojn en aliaj lingvoj? Mi dubas pri tio. Alia ekzemplo de la uzo de la afiksoj, kiun oni ne ofte trovas en aliaj lingvoj, estas la ebleco krei vortojn el akronimoj kiel "ILEI-anoj" kaj "SAT-anoj."

La kulturo de E-o enhavas specialajn simbolojn, ornamaĵojn, kaj agadojn, kiel la verdan stelon, la verdan

flagon kun la stelo, la Pasportan Servon, la himnon "La Espero," la jarajn Universalajn Kongresojn, kaj krome multajn aliajn internaciajn kunvenojn tra la tuta mondo kie ĉiuj havas ŝancon uzi E-on. Alia parto de la kulturo de E-o estas la ekzisto de kelkaj vortoj, kies signifo estas tuta mistero al ne-Esperantistoj, vortoj kiel "krokodilas" kaj "kabeis", kiujn oni ne povas simple traduki en aliajn lingvojn. Miaopinie ĉi tiuj trajtoj kune kun la literaturo kaj aliaj intelektaj kaj artaj materialoj pruvas, ke E-o ja havas kulturon eĉ se tio ne estas nacia kulturo.

Iom post iom la E-komunumo ekevoluigas eĉ specialajn gestojn! Ekzemple nun ekekzistas gesto, kiun oni povas uzi por indiki "Ĝis la revido!" Antaŭ kelkaj jaroj ĝi komenciĝis en San-Francisko je la fino de la Nord-Amerika Somera Kursaro. Kelkaj studentoj, kiuj venis al Usono el aliaj landoj, jam estis en la aŭtobuso por foriri al la flughaveno. Ekironte ili metis la manojn super la kapon por formi ĉapelon similan al la ĉapelo super la litero "ĝ" en la esprimo "Ĝis la revido!" Tiuj kiuj spektis ilin tra la fenestroj de aŭtobuso, tuj kaptis la signifon de tiu gesto kaj faris la saman. Ŝajnas, ke tiel eble ekekzistis nova adiaŭa gesto tute unika al la kulturo de E-o.

En septembro 1992 Claude Piron verkis ses-paĝan leteron en la angla lingvo, en kiu li respondis al la komento en la libro *Europe for everybody* (Eŭropo por ĉiuj), ke al E-o mankas kulturaj radikoj. Piron argumentas, ke

kvankam al la lingvo certe mankis kulturo komence, kiam Zamenhof iniciatis ĝin, tio ne plu estas la situacio. La nuntempa E-o, pro sia fleksebla karaktero, povis senprobleme sorbi influojn de diversaj naciaj kulturoj, eĉ de ne-Eŭropaj landoj kiel Japanio kaj Ĉinio. Piron komentas, ke "se E-o ankoraŭ ekzistas, tio estas ĉefe pro siaj kulturaj radikoj. Homoj, kiuj restas en la komunumo de E-o, faras tion pro sentoj rilate al la kulturo, ne pro la racieco de la lingvo. Ili spertas interkulturan etoson, kiun oni ne povas trovi aliloke."


Piron tiam mencias, ke la kulturo de E-o eĉ evoluigis du originalajn specojn de poezia formo, kiuj tute ne ekzistas en aliaj kulturoj. Unu unikan formon uzitan de Johán Valano (t. e. Claude Piron) en la libro *Malmalice* [eldonita de Literatura Foiro, Kuopio kaj Pisa, 1977] usona Profesoro Pierre Ullman [en angla-lingva artikolo "*Schizoschematic Rhyme in Esperanto*" en *Papers on Language and Literature*, 1980] nomas "schizo-schematic rhyme" ("skizoaranĝa rimo"). En tiu formo la rimoj estas ne inter la lastaj vortoj en diversaj linioj, sed nur inter la lastaj radikoj en la diversaj linioj, radikoj kiuj estas sekvataj de malsamaj finaĵoj. Tia poezia formo tute ne povas ekzisti en aliaj lingvoj ĉar ĝi dependas de la unika sistemo de radikoj kaj sufiksoj en E-o. Kiel iu ajn povas diri, ke E-o ne havas kulturon kiam ĝi eĉ havas siajn proprajn unikajn poeziajn formojn? En tiu bonega letero verkita en 1992 Piron konkludas, ke tiuj "lingvaj spertuloj", kiuj opinias, ke E-o ne havas kulturon, simple ne konscias pri la faktoj.

Kultura kaj lingva diverseco en edukado – evolutendencoj

En la unua parto de ĉi tiu artikolo [1] ni diskutis pri ĝeneralaj aspektoj de la multkultura edukado en la cirkonstancoj de tutmondiĝo.

Homaj rajtoj, protektado de diverseco, daŭrpova evoluo kaj paco estas la koordinataj aksoj laŭ kiuj takseblas la homara prospero kaj homa bonstato.

La celo de ĉi tiu parto de la artikolo estas pridiskuti aktualajn evolutendencojn kaj kontribuon de la E-komnumo, kaj speciale de ILEI, en la sfero de kultura kaj lingva diverseco en edukado.



Aktuala evoluo

En la lastaj jardekoj forte evoluas lingva kaj kultura ekologio kiel respondo al kreskanta risko de malapero de indiĝenaj lingvoj kaj estingiĝo de minoritataj kulturoj. David Crystal [2] en sia prelego en la 10-a Kongreso de Linguapax, Barcelono 2004, dediĉita al *Dialogo pri Lingva Diverseco, Daŭrpovo kaj Paco*, citis konstatojn laŭ kiuj pli ol duono de la lingvoj parolataj en la mondo estas mortantaj, respektive jam ne estas transdonataj al la sekva generacio. Tio signifas, ke post unu aŭ du generacioj plejmulto de la lingvoj formortos.

La endanĝerigo de lingvoj kaj de kultura heredaĵo estis alarme konstatitaj komence de la 1990-aj jaroj. Sekvis fondiĝo de naciaj kaj internaciaj institucioj kaj fondaĵoj kun la celo protekti la lingvan kaj kulturan diversecon kaj progresigi la edukadon konforme al proklamitaj lingvaj kaj kulturaj rajtoj. Revitaligo kaj dokumentigo de endanĝerigitaj lingvoj, enkonduko de forgesataj indiĝenaj lingvoj en lernejojn kiel eduklingvoj, dulingva edukado, rekonigo de lingvaj kaj kulturaj rajtoj kaj konservado de lingva kaj kultura heredaĵo estas kampoj en kiuj estis kaj plu estas realigataj teoriaj esploroj kaj surterenaj eduk-projektoj.

Instige kaj subtene al tiu procezo UN, UNESKO kaj aliaj instancoj aprobis kaj plu aprobadas konformajn dokumentojn kaj proklamas speciale dediĉitajn tagojn, jarojn kaj jardekojn, ekzemple: *Monda Tago de Kultura Diverseco, Tago de Patrina Lingvo, Jaro de Lingvoj, Jardeko de Kulturo de Paco kaj Senperforto* ks.

Paclingvistiko

Termino spegulanta la klimaton de opinioj aperintan dum la 1990-aj jaroj inter multaj lingvistoj kaj lingvoinstruistoj, en kiu lingvistikaj principoj, metodoj, malkovroj kaj aplikoj estas vidataj kiel rimedoj de promocio de paco kaj homaj rajtoj globnivele. Tiu aliro emfazas la valoron de multlingveco kaj lingva diverseco ambaŭkaze: internacie kaj enlande, kaj asertas la bezonon flegi lingvajn starpunktojn kiuj respektas la dignon de individuaj parolantoj kaj lingvaj komunumoj.

David Crystal, 1999: *Dictionary for Linguistics and Phonetics*

Dume tamen la procezo de kultura homogenigo kaj lingva hegemonio ne malfortiĝas. Ne maloftas ekzemploj de neglekto de lingvaj rajtoj aŭ manko de kultura egalrajteco. Eĉ ĉe instancoj kiuj plenvoĉe proklamas la netuŝeblon de homaj ratoj, EU ekzemple, aperas postenafiŝoj kiuj privilegias denaskajn parolantojn de la angla.

Kontribuo de la E-komunumo

La denaska idealo de la esperantistaro estas paca solvado de la prolingvaj konfliktoj surbaze de la universala neŭtrala lingvo en amika etoso de la granda rondo familia. Ŝajne ĝi anticipis la idealon de la moderna homaro kiel tutmonda komunumo, unueca en diverseco, kiu promocias pacan solvadon de konfliktoj kaj reciprokan rekonon kaj respekton, kaj garantias al ĉiuj egalan rajton je sukceso kaj daŭrpovo.

La du idealojn en la praktiko diferencigas la fakto, ke la ekster-esperantuja mondo ne rekonas E-on kiel solvon aŭ helpilon. Alia grava diferenco estas, ke la ekster-esperantuja mondo investas efektivajn rimedojn en praktikajn paŝojn sur la vojo al la idealo, dum la esperantistaro disponas modestajn materiajn rimedojn kaj ĉefe daŭrigas diskutojn en internaj rondoj pri la posedo de ideala rimedo por lingva demokratio kaj pri serĉado de manieroj

LA ESPERANTISMO estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn, donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj.

Deklaracio pri la Esenco de Esperantismo, 1905

Lanĉita en 1887 kiel projekto de helplingvo por internacia komunikado, kaj rapide evoluinta en vivoplenan, nuancoriĉan lingvon, E-o jam de pli ol jarcento funkcias por kunligi homojn trans lingvaj kaj kulturaj baroj. Intertempe la celoj de ĝiaj parolantoj ne perdis gravecon kaj aktualecon. Nek la tutmonda uzado de kelkaj lingvoj, nek progresoj en la komunikad-tekniko, nek la malkovro de novaj metodoj de lingvo-instruado verŝajne realigos […] principojn, kiujn ni konsideras esencaj por justa kaj efika lingva ordo.

Manifesto de Prago, 1996

kiel konvinki aŭtoritatulojn pri tio. Pliaj celkonscia malfermiĝo al la cetera mondo kaj integriĝo en ĝiajn evolufluojn estas bezonataj.

Longa estas la vojo inter la Zamenhofa "*interna ideo"* kaj ĝiaj eksteraj aplikoj. Sur tiu vojo elkreskis la diaspora E-komunumo kies plej videbla tavolo, laŭ J. Lindstedt [3], estas ĝia originala kulturo. E-o havas origine kaj oficiale perisman rolon de neŭtrala komunikilo inter popoloj kaj kulturoj jam ekzistantaj, "en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj", difinitan per la Bulonja *Deklaracio* [4]. Sed ĝi fariĝis ankaŭ portanto de "novtipa internacia kulturo" kaj siaspeca esperantista identeco, kion plej eksplicite emfazas la *Manifesto de Raŭmo.*

Tiu socia ento kiu elkreskis "sur neŭtrala lingva fundamento" havas sian deklaran respondon al alarmoj de lingvaj kaj kulturaj ekologistoj fine de la pasinta jarcento. Ĝi estas resumita en la *Praga Manifesto* [5] aprobita dum UK en la jaro 1996. La manifesto reasertas la funkcikapablon de E-o en translingva kaj transkultura komunikado kaj emfazas la intereson de esperantistaro pri justa kaj efika lingva ordo. Samtempe kaj samloke la *Nitobe-Simpozio*, laŭ [6], starigis tri principojn surbaze de kiuj atingeblas "justa, efika kaj vivinda lingva ordo en la mondo":

a) la konservado de lingva kaj kultura diverseco;
b) la garantiado de lingvaj homrajtoj, inkluzive de adekvata edukado en la denaska lingvo kaj efika instruado de aliaj lingvoj;
c) altkvalita, reciproka, vaste alirebla lingva komunikado inter grupoj malsamkulturaj kaj malsamlingvaj.

Ne estas malfacile rekoni tiujn principojn en la 5 jarojn posta *Universala Deklaracio pri Kultura Diverseco* kaj aliaj dokumentoj de Unesko kaj UN celantaj konservadon de kultura kaj lingva diverseco kaj difinantaj celojn de vivinnda homara evoluo. Tio ŝovas fokuson de la esperantismo al pli aktiva rolo ol estas la "penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa", kiel ĝin difinas la *Bulonja Deklaracio*. Por multaj esperantistoj ĝi hodiaŭ signifas strebadon al lingva ordo kiun Jonathan Pool kaj Mark Fettes [7, 8] nomas *interlingvismo* kaj proponas jenajn postulojn pri trajtoj kiujn ĝi havu: *diverseco* (prospero de multaj lingvoj en ĝi), *integriĝo* (komunikado kaj kunlaboro trans lingvaj

baroj), *justeco* (ŝancoj kaj rajtoj ne dependu de ies denaska lingvo), *efikeco* (efikaj, rapidaj kaj malmultekostaj lingvouzaj iloj), *daŭrpovo* (longdaŭraj solvoj por la lingvaj problemoj).

Multaj klopodoj estas necesaj en la sferoj de lingva politiko, lingvaplanado kaj edukado por atingi la interlingvisman lingvan ordon. La *Praga Manifesto* emfazas transnacian edukadon kaj pedagogian efikecon en lingvolernado. Sed manifestoj ne sufiĉas. La mondo de diverseco bezonas efektivajn servojn kaj praktikajn rezultojn. Tiusence la *Strategia Laborplano 2001-2010 de UEA* difinas agadkadron en kiu ankaŭ ILEI trovas sian lokon. Universalaj kongresoj de E-o kaj aliaj internaciaj E-kongresoj kaj konferencoj kiel siaspeca kultura kaj socia fenomeno favoranta kaj konfirmanta la praktikan valoron kaj socian signifon de E-o, Nitobe-simpozioj, E-o kiel origina literatura lingvo kaj pontolingvo inter naciaj literaturoj, trejnseminarioj de TEJO, la projektoj *Lingvo de Paco*, *InterKulturo*, *NESTO* kaj multaj aliaj estas bonaj, tamen ne sufiĉaj ekzemploj de konkreta ĉi-terena agado.

Kontribuo de ILEI

Kadre de sia laŭstatuta E-movada rolo, ILEI en sia agado ĉiam pli celas al malfermiĝo kaj al utiligo de E-o ankaŭ al neesperantistoj. La projekto InterKulturo estas ekzemplo de longdaŭra kaj mondvasta edukado al paco kaj interkultura komunikado. Ĝi estas plu evoluigata kaj vastiganta sian celgrupon ekster Esperantujo. Per sia plurlingva retpaĝaro, nun konstruata, ĝi celas kreskigi siaspecan IK-komunumon – plurlingvan diversnacian kaj multkulturan kolektivon de agantoj en kiu ĉiuj lingvoj estas egalrajtaj. La baza laborlingvo de IK estas la internacia lingvo E-o, sed la interfaco kaj tekstoj estas tradukataj en kelkajn lingvojn kaj estos tradukeblaj en ajnan alian lingvon.

Alia ĉi-tema iniciato, kiun ILEI aktuale traktas estas harmoniigo de lernado, instruado kaj ekzamenado de E-o kun kriterioj kaj normoj por fremdlingva lernado, instruado kaj taksado kiuj validas en oficialaj eduk-sistemoj. Tio implicas formadon de kvalifikitaj kaj kvalitaj E-instruistoj konforme al tiuj kriterioj kaj normoj. Kompreneble, ankaŭ aliaj agadoj kaj agadrimedoj de ILEI estas celataj subtene al lingvaj rajtoj kaj edukado inkluziva por diversaj kulturaj fonoj, mondkonceptoj kaj lernostiloj.

Konkludo

La aktuala homara evoluo kun proklamitaj garantioj pri homaj rajtoj kaj protektado de kultura kaj lingva diverseco, rekonfirmas aktualecon kaj vitalecon de la originaj idealoj de esperantismo. Sed kiel la la homaro ankoraŭ ne trovis la ĝustan kaj justan vojon al la idealo de unueco en diverseco, same tiel la E-o ne sukcesas plene rekonigi kaj efektivigi sian rolon en edukado al diveresco kaj en konstruado de justa komunika kaj lingva ordo.

Malfermiĝo de E-institucioj, organizado de esperantistaj kongresoj kaj konferencoj kun partopreno de ne-esperantistaj fakuloj kaj interesatoj, publikaj aranĝoj, kiaj estas lingvaj kaj kulturaj festivaloj, partopreno en sciencaj kaj fakaj konferencoj kun traktaĵoj pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj, esperantistaj esplor- kaj eduk-projektoj subtenataj de ne-esperantistaj institucioj, utiligado de E-o en ĉiuj sferoj de homa agado kaj celtrafa informado tra amaskomunikiloj kaj informretoj estas irendaj vojoj al rekonigo de E-o kaj ĝia rolo en la homara evoluo. La pozitivaj spertoj akiritaj sur tiuj vojoj estas ankoraŭ modestaj, tamen kuraĝigaj kaj direktomontraj.

Bibliografio:

[1] Petrović, R. (2005) Kultura kaj lingva diverseco en edukado – bazaj konceptoj, IPR 2005/3, p. 14–20

[2] Crystal, D. (2004) Creating a World of Languages http://www.linguapax.org/congres04/pdf/crystal.pdf

[3] Lindstedt, J. (2000) *La Manifesto de Raŭmo: historia enkonduko – kaj elkonduko*. http://www.helsinki.fi/~jslindst/raumo-jl.html

[4] Deklaracio pri la Esenco de Esperantismo, Bulonjo-ĉe-Maro,1905, legebla ĉe http://boulogne2005.online.fr/eo/historio/esperantismo.htm

[5] Manifesto de Prago, 1996, legebla ĉe http://www.geocities.com/kyrmse/Praga_Manifesto.htm

[6] Mark Fettes kaj Suzanne Bolduc (Red.): Al lingva demokratio, Aktoj de la Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj, Prago, 20-23 julio 1996, Universala E-Asocio, Rotterdam 1998

[7] Jonathan Pool kaj Mark Fettes, 1998, La interlingvisma defio - Invito al esplorado, http://esperantic.org/esf/ismo.htm

[8] Mark Fettes, 1998, Can Language Policy and Planning Become Interlingual?, http://esperantic.org/esf/ism2.htm

Radojica Petrovîć,
<radp@ptt.yu>

Kovács Márta:
Esperanto en la abiturienta sistemo de Hungario



Ekde la lernojaro 2004/2005 ekvalidis en hungaraj mezlernejoj nova abiturienta sistemo. Estas ĝojige, ke E-o daŭre restas abiturienta studobjekto.

La abiturienta sistemo

La ĉefa novaĵo de la sistemo estas la enkonduko de dunivelaj ekzamenoj: pri ĉiuj ekzamenaj studobjektoj estas proponita ekzameno je meza nivelo por atesti la finon de mezlernejaj studoj kaj tion je altigita nivelo, kiu principe servus ankaŭ kiel enirekzameno por superaj studoj. La meznivelaj ekzamenoj daŭre okazas en la lernejoj, la altigitaj antaŭ sendependaj, aparte rajtigitaj trikapaj komisionoj. Alia novaĵo estas, ke oni rajtas ekzameniĝi en iu ajn sesio dum la mezlernejaj studoj kaj eĉ poste; la ekzamenoj koncerne la opajn studobjektojn ne nepre okazas samtempe. (Ekzemple iu povas trapasi mezan ekzamenon pri geografio estante 16-jara, pri germana lingvo atinginte siajn 17 jarojn, pri tri aliaj studobjektoj fine de la mezlernejaj studoj, t.e. 18-jaraĝe, kaj kiel 20-jarulo povas refari la geografian ekzamenon je altigita nivelo.)

Oni rajtas trapasi ekzamenon pri ajna studobjekto, kiu oficiale estas instruata en iu hungara mezlernejo. Estas 4 devigaj studobjektoj: hungara lingvo kaj literaturo/gepatra lingvo, matematiko, historio, fremda lingvo; kaj unu libere elektebla. Kompreneble ankaŭ la libere elektebla studobjekto povas esti iu dua fremda lingvo.

La ekzamena materialo estas ellaborita per centra instanco. Ankaŭ la korektado kaj prijuĝo okazas laŭ centre difinitaj kriterioj.

Abiturienta ekzameno pri fremdaj lingvoj

Inter la fremdaj lingvoj troviĝas la latina kaj dudeko da vivaj lingvoj. En tiu grupo estas proponita ankaŭ E-o (krom la angla, germana, franca, hispana, rusa, itala, pola, japana, bulgara, pola, cigana, araba, novgreka, hebrea, slovena, portugala, nederlanda, finna). La supre menciita regulo validas ankaŭ kaze de lingvoj: ĉiu lingvo instruata oficiale en iu hungara mezlernejo povas esti abiturienta studobjekto. La kondiĉo de oficiala

instruado estas, ke la studobjekto enhavu la pedagogian programon de la koncerna lernejo. Enprogramigeblas studobjekto, kiu havas aprobitan studprogramon (E-o havas ĝin kiel viva fremda lingvo) kaj por ties instruado la lernejo dungas rajtigitan instruiston.
Por trapasi fremdlingvan abiturientan ekzamenon rajtas anonci sin la lernantoj sendepende de tio, kie kaj kiel ili alproprigis al si la lingvo-konon. Nura antaŭkondiĉo estas, ke la ekzamenoto devas havi jarfinajn notojn laŭ la studprogramo de la koncernata fremda lingvo. Se ĝi ne estas instruata en la lernejo de la kandidato, li aŭ ŝi devas enskribiĝi kiel gastlernanto al iu lernejo, kie oni instruas tiun fremdan lingvon, kaj akiri tie dum ekzameno la bezonatajn jarfinajn notojn.
La enhavo de la fremdlingva abiturienta ekzameno same estas unueca. La ekzamenoj estas unulingvaj (cellingvaj) kaj kompetentbazaj. Laŭ la skalo de referenckadro de Eŭropa Konsilantaro la meza estas je la niveloj A2 kaj B1, la altigita je B2. Ili havas skriban kaj buŝan partojn. La skriba ekzameno okazas laŭlingve en la sama tago tutlande, la buŝajn trapasas la lernanto samtage pri pluraj studobjektoj, se li/ŝi kandidatiĝis je pluraj objektoj en la sama sesio. Skribe estas ekzamenataj la legokompreno, aŭdokompreno, gramatika korekteco kaj libera sinesprimo. Vortaron oni rajtas uzi nur en la parto *libera sinesprimo*.
La 4 partoj de la skriba ekzameno kaj la buŝaj eroj kune (konversacio, situacia ludo/debato kaj memstara temoprezento) havas la saman proporcion (20 %) en la prijuĝo de la altigita nivelo, proksimume la saman en la meza.
Kroma specialaĵo de la fremdlingvaj abiturientaj ekzamenoj estas tio, ke oni povas havigi per ili apartajn atestilojn pri lingvokono, kiujn ĝis nun oni povis akiri en elektitaj ekzamencentroj. En la altigita nivelo la 40-60 procenta abiturienta rezulto egalvaloras bazan, 60-100 procenta egalvaloras mezan ŝtatan lingvoekzamenon. Tia ekzameno povas esti antaŭkondiĉo de diplomiĝo, aŭ kelkloke ĝi povas esti premiita per kromsalajro.[2]

Specimenaj taskoj el la E-lingva abiturienta ekzameno
Por havi ideon pri la postuloj kaj formoj de la ekzameno, vi trovos ĉi-sube po unu taskon el la ekzamenparto *lega kompreno* de ambaŭ niveloj. (Estas entute po 3 taskoj!)

[2] En 2004a trapasis tian ŝtatan ekzamenon pri E-o je la meza nivelo 2623 personoj.

MEZA NIVELO – LEGA KOMPRENO

Kion ili diris? Trovu la parton, kiu mankas el la frazo kaj skribu en la tabelon la literon de la parto.

(0) estas ekzemplo por vi!

Mensogulo

Estis iam reĝo. Foje la reĝo proklamis en sia lando: „Kiu mensogos tiel, ke mi diru: tio estas mensogo, _____0_____.”

Venis iu paŝtisto kaj diris: „Longan vivon al la reĝo! Mia patro havis bastonegon, kiun li etendis kaj _____1_____.”

„Tio povas okazi – respondis la reĝo. – Ankaŭ mia avo havis ĉibukon, kies unu finon li metis en la buŝon kaj ____2_____.”

La mensogulo foriris gratante al si la kapon. Venis iu tajloro, kiu diris:

„Senkulpigu min, reĝo, mi devis pli frue veni, sed malfruiĝis. Hieraŭ multe pluvis, fulmoj eksplodis, la ĉielo disŝiriĝis kaj ____3____.”

„Vi bone faris – diris la reĝo – , sed vi malbone flikis. Hodiaŭ matene _____4_____.”

Ankaŭ la tajloro foriris. Eniris malriĉa vilaĝano kun mezurpoto sub la brako. „Kion vi volas povrulo?” – demandis la reĝo.

„Vi ŝuldas al mi unu mezuron da oro, kaj ____5____-.”

„Unu mezuron da oro? – ekmiris la reĝo. – Vi mensogas, _____6_____.”

„Se mi mensogas, ____7_____.”

„Ne, ne _____8_____! – ŝanĝis sian vorton la reĝo.

„Nu, se mi pravas, _____9_____.” *(el Juna amiko 91/4)*

A. denove iom da pluvo falis
B. donu al mi la duonon de via regno
C. mi iris por fliki ĝin
D. donu al mi la mezuron da oro
E. la alian etendis kaj ekbruligis de la suno
F. mi oron ne ŝuldas al vi
G. al tiu mi donos la duonon de mia regno
H. mi venis por preni ĝin
I. miksis per ĝi stelojn en la ĉielo
J. vi pravas[3]

0	1.	2.	3.	4.	5.	6.	7.	8.	9.
G									

[3] La solvo de la meznivela tasko: 1-I, 2-E, 3-C, 4-A, 5-H, 6-F, 7-B, 8-J, 9-D

ALTIGITA NIVELO – LEGA KOMPRENO

Respondu mallonge al la demandoj!

(0) estas ekzemplo por vi.

Batu la bananon, Billy!

Jen belega propono por ĉiuj ŝatantoj de komputilaj ludoj. Billy posedas la ĉarmon de malnova klasika arkad-ludo kaj ĝi ravas per siaj magiaj mondoj kiuj altiras kaj infanojn kaj plenkreskulojn. Nia heroo endormiĝas kaj forveturas al revo-lando, kie li devas alfronti, kaj trompi strangajn monstrojn, kiuj provas bari la vojojn de fantazio.

La ludo konsistas el kvin diversaj mondoj, en kiuj oni devas trairi pli ol cent nivelojn. Estas belege desegnitaj la ĝangalo, la konstruejo, la koral-insulo, kaj vi malkovru mem kio ankoraŭ. Ĉiuj rolantoj aperas tridimensie kaj produktas diversajn sonojn, dum la ludo estas akompanata de KD-muziko. Oni renkontas figurojn, kiel bananojn, ananasojn, martelojn, lampojn, marstelojn kaj multajn aliajn. La tasko de Billy estas fari truojn per hakilo, borilo aŭ aliaj disponeblaj iloj kaj faligi la monstrojn, kiam ili eniras en la kaptilon. Al Billy helpas diversaj iloj, kiujn li povas trovi dum la ludo: tenispilkoj, kurŝuo, aŭ plia vivo. La ludo havas neperfortan, infanamikan ideon, ĝi estas konvena por ĉiuj pli aĝaj ol kvin jaroj, vi tamen ne glitu sur la eldiraĵo "kvin jaroj", ĉar la ludo havas du gradojn de facileco, kaj eĉ spertaj ludantoj bezonas kelkajn horojn por trairi ĉiujn nivelojn. La plezuro tamen estas granda pro la ekrana fajneco (800*600), bela muziko, komentoj pri la lerteco de Billy en E-o. La teksto estas montrebla en longega listo de lingvoj krom E-o, se vi ankoraŭ ne bone parolas la internacian, verŝajne vi povas trovi vian propran nacian lingvon eĉ se ĝi estas la feroa, galega aŭ bosnia. Por la ludfanatikuloj estas antaŭvidita ebleco por navigilo. *(el Kontakto 2001/6)*

0. Billy estas la heroo de *komputila ludo*.
9. Ĝin povas ludi infanoj _____ .
10. Ankaŭ _____ povas ĝin ĝui.
11. La ludo havas _____ nivelojn,
12. kaj _____ de facileco.
13. La ludo povas daŭri _____ .
14. Billy renkontas monstrojn en _____, kaj
15. li devas _____ ilin el kaptiloj.
16. Estas kvin diversaj mondoj, ekzemple _____.
17. La ludon akompanas muziko kaj _____ .
18. La paroloj estas en _____ .[4]

[4] La solvo de la specimena tasko de la altigita nivelo: 9. pli aĝaj ol kvin jaroj plenkreskulo(j) 10. plenkreskuloj 11. pli ol cent 12. du gradojn 13. kelkajn horojn 14. revo-lando (magia- ks.) 15. faligi 16. la ĝangalo, la konstruejo, la koral-insulo 17. diversaj sonoj 18. E-o kaj en multaj naciaj lingvoj

Pliaj specimenaj ekzameneroj legeblas ĉe <*www.ilei.info/hungario* >

***

Pritakso de la sistemo

El la vidpunkto de la mezlernejaj instruistoj la ŝanĝoj estas parte bone akceptitaj. La prestiĝo de la abiturienta ekzameno altiĝos, se oni vere ne postulos kroman ekzamenon antaŭ ol povi komenci supergradajn studojn. Same bonefikos, ke la pritakso de la fremdlingvaj konoj reiros en la lernejojn. Aliparte, koncerne la laŭnivelajn postulojn, oni havas pli da duboj. La meza nivelo estas multe pli malalta ol ĝi estis ĝis nun, kiam ni havis nur unu nivelon. Male la altigita estas nur iom malpli alta ol la stelplena ĉielo, do estas riske elekti ĝin. La lingvaj ekzamenoj estas esence alitipaj ol ili estis ĝis nun (antaŭe estis kvar egalgravaj eroj: du tradukoj al la hungara, gramatika testo kaj konversacio), do necesas ankaŭ alitipa metodika aliro en la instruado. Simila situacio ekestis ankaŭ ĉe aliaj studobjektoj (historio, hungara literaturo ktp).

La tuta sistemo iĝis tre komplika pro la multobliĝo de sesioj, de la tipoj de ekzamenoj, pro la plilarĝigo de la aĝo de kandidatoj; en la administrado de la rezultoj kaj atestiloj. La ampleksigo de la skribaj eroj povos kaŭzi problemojn en la liverado kaj sekura traktado de la taskofolioj.

Resume kaj pro metodikaj kaj pro ekonomiaj kialoj povos okazi ŝanĝoj…

Alvoko de la verkinto

Estas do ĝojige, ke E-o daŭre restas abiturienta studobjekto en Hungario. Ties antaŭkondiĉo tamen estis, ke ĝi iĝis tio jam antaŭ pluraj jardekoj, ke ĝi estis instruata en mezlernejoj, ke ekzistas diplomitaj pedagogoj, kiuj rajtas ĝin instrui. Aliflanka grava faktoro estas, ke la lingvoinstrua politiko de la lando estas tolerema kaj favora al la tiel nomataj malgrandaj aŭ malofte instruataj lingvoj. Verŝajne E-o havus pli grandan ŝancon plu vivi en la sistemo, se la hungaraj ebloj ne estus unikaj. Mi havas du petojn:

1. Mi ŝatus havi informojn pri tiuj landoj, kie la abiturienta sistemo ebligas/us ekzameniĝon pri E-o.

2. Rilate al la situacio en Eŭropo, ni scias, ke instruado daŭre restos regata ŝtatnivele. Tamen estas instancoj, kiuj vortumas rekomendojn. Kiel ILEI kaj ties anoj povus kunlabori kaj kontribui cele al influo je tiuj instancoj aŭ rekte je naciaj edukministerioj? Se vi havas ideon pri tio, ne hezitu skribi ĝin al mia adreso, por ke kunagado estu ekorganizota!

La strukturo de la Esperantlingva abiturienta ekzameno

MEZA NIVELO				
Ekzamenero		Daŭro (minutoj)	Proporcio (%)	Poentoj
skriba	lega kompreno	60	22	33
	gramatika korekteco	30	12	18
	15 minuta paŭzo			
	aŭskulta kompreno	30	22	33
	libera sinesprimo	60	22	33
parola	○ konversacio ○ situacio ○ memstara temoprezento	15	22	33
Skriba kaj parola kune		—	100	150

ALTIGITA NIVELO				
Ekzamenero		Daŭro (minutoj)	Proporcio (%)	Poentoj
skriba	lega kompreno	70	20	30
	gramatika korekteco	50	20	30
	15 minuta paŭzo			
	aŭskulta kompreno	30	20	30
	libera sinesprimo	90	20	30
parola	○ konversacio ○ debato ○ memstara temoprezento	20	20	30
Skriba kaj parola kune		—	100	150

Márta Kovács
<kovacsm@berzsenyi.tvnet.hu>

Ni konferencis en Kaunas…

El la taglibro de partoprenanto[5] *…*

30.07.2005 (sabato)
Vespere okazis la interkona kunveno. Alvenis al Kaunas 64 personoj el ĉiuj kontinentoj: Eŭropo, Azio (Japanio, Nepalo), Aŭstralio, Afriko (Togolando), Nord-Ameriko (Usono) kaj Mez-Ameriko (Kubo).

31.07.2005 (dimanĉo)
Okazis la malfermo, fare de Aida ČIŽIKAITĖ. La ĉeestantojn salutis Dainora GRUNDEY, la vic-dekanino de la universitato (en kies konstruaĵo okazis la konferenco).
Stefan MACGILL, la vic-prezidanto de ILEI, diris, ke „Litovio gravas por Esperanto; Zamenhof vivis dum kelka tempo en Litovio kaj aŭdis la litovan lingvon; lia edzino venis el la kvartalo de la urbo kie ni nun troviĝas".
Poste ekparolis s-ino Jadvyga KRŪMINIENĖ, estrino de la sekcio Ĝermana Filologio de Vilnius Universitato Kaunas Humanisma Fakultato, dirante, ke ni estas ŝatantoj kaj protektantoj de lingvoj.
Dum la dimanĉa mateno okazis ankaŭ E-lingva meso en la apuda preĝejo de Vytautas la Granda.
La dimanĉo estis la tago de la *Lingva Festivalo*. La celo estis prezenti al ni ĉiuj kaj al la ekstera publiko la diversecon de lingvoj kaj la gravecon de la internacia lingvo E-o. Por la Festivalo oni disponigis posttagmeze en urba parko kvin grandajn „sunombrelojn". Ĉe ĉiu ombrelo oni pritraktis kvar naciajn lingvojn. Ĉiuj 20 lingvoj havis proksimume 25 minutojn.
Post la prezentado kantis pola infankoruso el la urbo Pelplin. Vespere okazis kantado kaj dancado de koruso „Gimtinė" (Patrujo).

01.08.2005 (lundo)
Mihael TRIFOI el Rumanio prelegis pri sia lernejo en Bixad. Li partoprenis/as en pluraj projektoj, inter aliaj en *Fundapax*; pro tio E-o estas oficiale en la studprogramo de lia lernejo.

[5] NdlR – Pro manko de spaco ni devis mallongigi la raporton, do, kelkaj eroj kaj la fotoj mankas en ĝi! La tekston kelkloke kompletigis kaj korektis ankaŭ Aida ČIŽIKAITĖ, precipe, kie temis pri litovaj nomoj.

Gerard COOL el Aŭstrio prelegis pri *Alternativa lernejo en Alpa montaro*. Temis pri lernejo en Svislando kie li iam instruis.
Pri la projekto Comenius de Eŭropa Unio parolis Jacqueline POUX. En la projekto *Comenius* estas diversaj aliaj projektoj, sed ŝi diris, ke oni ne permesas uzi aŭ instrui E-on, ĉar ĝi ne estas „lingvo de Eŭropo".
La titolo de la prelego de David KELSO el Britio estis *15 jaroj kiel inspektoro pri edukado.*
Li klarigis, ke en Britio en postbazaj lernejoj oni rajtas instrui ĉiajn lingvojn libervole. Li diris, ke estas raraj la bonaj instruistoj, tial seminarioj por estontaj instruistoj estas ege gravaj por E-o.
Carola ANTSKOG el Finnlando parolis pri *Instruado de Esperanto per si mem.* Ŝi diris, ke la lernejoj en Eŭropa Unio povus peti monon de EU por instrui E-on en la kadro de la projekto *Eŭroscola.*
Jean-Pierre BOULET prelegis pri la *Rilatoj kun UNESKO*. Li diris, ke 15 milionoj da homoj lernis E-on. Li klarigis la gravecon de la *Manifesto 2000* kaj petis la ĉeestantojn subskribi ĝin. [*La tekston oni povas peti de li, lian adreson vidu sur p. 39. – NdlR*]
Posttagmeze ni povis partopreni *ekskurson tra la urbo Kaunas* kun gvido de Dalia PILECKIENĖ. Ni vizitis la straton, kie troviĝas la domo, en kiu la edzino de Zamenhof naskiĝis (nun ĝi estas la sidejo de Litova E-Asocio).
Okazis ankaŭ *akcepto ĉe la urbestro en la urbodomo* kaj *koncerto de klasika muziko*. Esperantistino kaj profesia flutistino Lidija GOMOLICKAITĖ -GRUDZINSKAITĖ ludis en luterana preĝejo, situanta en korto de la universitato kie ni konferencis.

02.08.2005 (mardo)
Tuttaga *ekskurso al la nacia parko de Aukštaitija*, kiu troviĝas en la nordokcidenta parto de Litovio.
Vespere okazis iom *moderna koncerto*. Nuntempa komponisto Gierdius KUPREVIČIUS, inspirita de pentraĵoj de la ciklo „Kreo de mondo" de M. K. ČIURLIONIS, verkis muzikon kaj la pentraĵoj de ČIURLIOINIS en komputila versio moviĝis laŭ la muziko.

03.08.2005 (merkredo)
Tago de la s*impozio.* Aro da prelegoj estis organizita de ILEI kaj la Universitato kune. La temo de la simpozio estis la sama de la konferenco, nome: *Interkultura komunikado en edukado.*

Edukado en sendependa Litovio (fare de Eugenija VAITKEVIČIŪTĖ) estis la nomo de la unua prelego en litova lingvo kun E-traduko. Kelkaj junaj kunlaborantoj de la Universitato, prelegis laŭtlegante anglajn kaj litovajn tekstojn.
Nina DANILJUK el Ukrainio prelegis pri *Stereotipoj: antaŭjuĝoj, konduto, parolo, vivmaniero*. En diversaj lingvoj estas diraĵoj pri aliaj popoloj.
Algimantas PILIPONIS, direktoro de teknika kolegio de Vilnius, raportis pri sia multjara sperto pri instruado de E-o.
Poste okazis ankaŭ akcepto ĉe vicdekanino, kie esperantistoj povis konatiĝi kun la universitatanoj kaj starigi personajn kontaktojn.
Vespere ni vidis unupersonan teatraĵon *Litovio de Barbora*, kiun prezentis Birutė PREKEVIČIŪTĖ. Laŭ la historia dramo „Barbora Radvilaitė“ de la fama litova dramisto Juozas GRUŠAS, ŝi mem pretigis por si la spektaklon kaj prezentis ĝin ankaŭ dum UK. Ĝin sekvis la unua parto de la internacia vespero. La konferencanoj prezentis siajn landojn laŭ manĝaĵoj, trinkaĵoj k.s.

04.08.2005 (ĵaŭdo)
Antaŭtagmeze okazis komitata kunsido. Posttagmeze oni ekskursis al subĉiela muzeo de popola vivmaniero en la loko Rumšiškės. Vespere estis *bankedo* en ejo de kastelo. De tie revenintaj ni komencis la *„internacian (adiaŭan) vesperon“*. Stefan prezentis kune kun siaj du filinoj teatraĵeton pri nekontenta gasto en restoracio. Julian el Kubo bele kantis kantojn kun akompano de gitaro. Mihael TRIFOI igis la ĉeestantojn ridi per „kvazaŭa kanto“.

05.08.2005 (vendredo)
Matene estis la tago de foriro kaj ankaŭ de adiaŭo.

Kelkaj rimarketoj pri la konferenco:
La prelegoj havis la jenajn mankojn: La parolado kelkfoje ne estis bone aŭdebla kaj la prezentitaj tekstoj kaj bildoj ne ĉiam estis bone videblaj. Kelkaj parolantoj de la kunsidoj ne klare indikis sian nomon, tiel oni kelkfoje aŭskultis personon, kies nomon oni ne konis. Mankis montrobastoneto por klare indiki pri kiu frazo aŭ teksto oni prelegis.

S.P. Smits
Lange Noordweg 3, NL-4453 RC 's-Heerenhoek, spsmits@hotmail.com

Tago de la Lernejo dum UK

La 26-a de julio 2005, Vilnius, Litovio

La tradician programon de ILEI en UK ĉi-jare gvidis *s-inoj Jennifer BISHOP* kaj *Mireille GROSJEAN*. Enkonduke estis laŭtlegita salutmesaĝo de la neĉeesta ILEI-prezidanto *Radojica PETROVIĆ*, kiu emfazis:

Paca kunvivado en lingva diverseco estis la inspira idealo pro kiu Zamenhof kreis la Internacian Lingvon. Konservado de lingva kaj kultura diverseco kaj unueco en la diverseco hodiaŭ estas la idealo al kiu strebas la homaro. La edukado al diverseco estas homara bezono en kiu Esperanto daŭre retrovas siajn rolon kaj ŝancon. Prelegantoj de la Tago de la Lernejo lumigas diversajn aspektojn de tiuj rolo kaj ŝanco kun konkretaj ekzemploj el la praktiko de E-eduka agado.

Ĉeestis plurdeko da kongresanoj, plejparte membroj de ILEI, sed ankaŭ aliaj interesatoj. La programo konsistis el prelegoj kaj perkomputilaj prezentoj en granda impona salono ekipita per sendrata retkonekto. Tamen, la 17 prezentantoj de la 20 eroj bedaŭrinde ne ĉiam sukcesis venki la teĥnikon kaj devis lukti kontraŭ la aparatoj. Alia lukto estis kontraŭ la tempo – tro mallonga por permesi paŭzojn inter la prelegoj kaj ebligi demandojn kaj diskutojn. La programeroj grupiĝis ĉirkaŭ kvar ĉefaj temoj.

1. La eduka sistemo en la baltaj landoj

Estas tradicio de la *Tago de la Lernejo* (TdL), ke la publiko konatiĝas kun la lerneja sistemo de la kongreslando. Ĉi-jare tiu parto de la programo estis dediĉita al ĉiuj tri baltaj landoj. *Prof. Aloyzas GUDAVIČIUS* prezentis la edukan sistemon de Litovio. Ĝi travivis grandajn ŝanĝojn post la sendependiĝo de la lando, kiuj ĉefe tuŝis la enhavon de sociaj kaj humanismaj fakoj kaj la organizan strukturon de edukado. Nun en Litovio ekzistas du ŝtupoj de meza edukado: la deviga dekjara lernejo kaj dekdujara mezlernejo. Diplomon de supera neuniversitata kleriĝo oni povas ricevi post abiturientiĝo de tiel nomataj kolegioj. Universitatajn diplomojn de bakalaŭro (post kvarjara studado) kaj magistro (post sesjara studado) oni enmanigas en dek kvin ŝtataj kaj kvar privataj universitatoj.

Ankaŭ en la edukaj sistemoj de Latvio kaj Estonio multo ŝanĝiĝis post la disfalo de la soveta reĝimo. La prelego de *s-ro Aldis BUŠS* celis kompari plusojn kaj minusojn de la reformoj en Latvio el ambaŭ vidpunktoj — de la

instruistoj kaj de la lernantoj. En Estonio, laŭ *s-ro Madis LINNAMÄGI*, la sistemo estas daŭre reformata. La universitata edukado estas ekde 2003 ordigata laŭ la Bolonja Deklaro (1999). La ĝenerala edukado elementa (1-9 klasoj) kaj mezgrada 10-12 klasoj) ricevos en 2007 novajn ŝtatajn studprogramojn, tio vere estos reformo je kvalito. Kiel soveta heredaĵo ekzistas ankoraŭ ŝtataj lernejoj por enmigrintaj ruslingvanoj (28% da loĝantoj naskiĝis alilande).
La instruado de E-o en la kongreslando Litovio estis temo de la prelego de *s-ino (mag.) Vera VALENTAITĖ*. Mankas oficiala statistiko, kiu ebligus objektivan pritakson, sed E-o estas instruata en Litovio kaj E-instruistoj sufiĉe serioze preparataj en ĉiuj tri niveloj de Cseh-metodaj seminarioj.

2. Instrucentroj

Estis prezentitaj ok E-edukejoj en Eŭropo kaj Azio. *S-ino Aida ČIŽIKAITĖ* prelegis pri E-domo en Litovio, troviĝanta en apudrivera malgranda strateto en malnova urboparto en Kaunas. Ĝi iam apartenis al sapfabrikisto *Aleksandr ZILBERNIK*, bopatro de Ludoviko Zamenhof, kiu konsentis, ke lia filino *Klara* investu duonon de sia doto por eldoni *La Unuan Libron* en la jaro 1887. Nuntempe la strateto portas la nomon *Zamenhofo* kaj en la domo n-ro 5, kiun oni vere povas nomi E-domo, troviĝas la sidejo de Litova E-Asocio.
La Japanan E-Domon, kiu situas en tre bela montara regiono 150 km for de Tokio, prezentis *s-ro Yasuo HORI*. Ĝi funkcias kiel biblioteko kaj lernejo de E-o ekde 1994. Dek-kelkaj komitatanoj deĵoras ĉiujn sabaton kaj dimanĉon kaj dum la somera libertempo por akcepti multajn vizitantojn.
Per la prelego de *s-ro LEE Jung-kee* oni povis konatiĝi kun la ampleksa agado de la *Seula E-Kulturcentro*, interalie kun la E-kursoj en universitatoj en Koreio kaj kun la civitana kurso de Seula E-Kulturcentro.
La du funkciigintoj de la novfondita Interkultura Centro Herzberg (ICH), Germanio, *s-ino Zsófia KÓRÓDY* kaj *s-ro Petro ZILVAR*, prezentis la novajn kunlaborplanojn inter GEA kaj ILEI helpe de ICH kaj informis pri agado de tiu klerigejo de GEA: tutjara laborplano kun lingvaj kursoj je ĉiu nivelo, klerigado/trejnado de instruantoj kaj instruistoj, fakseminarioj, agado naci-kaj internaciskale. La publiko povis konatiĝi kun la nova iniciato de GEA kaj ILEI: *Tutlandaj Pedagogiaj Tagoj en Germanio* 1-3 oktobro 2005 en Herzberg (ICH).
Pri la Irana E-Centro prelegis *s-ro Reza TORABI*. Ekde 1996 senĉese oni okazigas E-kursojn en la centro, kiujn prizorgas ILEI-sekcio Irana kaj ties

membroj. La ĉefa lernomaterialo estas *Tendaraj Tagoj* kaj *Mazi-Kurso*. Oni okazigas ankaŭ korespondan kurson surbaze de la *Junul-kurso* de antaŭ 10 jaroj. 80 % el la nova generacio de E-o en Irano estas edukita de Irana E-Centro.
S-ro Ed BORSBOOM prelegis pri la Internacia E-Instituto, por kiu la jaro 2005 estas jubilea. La ekesto de la Instituto en 1930 kaj ĝia propra kontoro en Riouwstraat, Hago, estas streĉa peco en la historio de la E-movado. Oni povis aŭdi ankaŭ pri la plej granda pedagogo, kreinto de instrumetodo por E-o kaj edukinto de miloj da novaj esperantistoj: Andreo Cseh.
Per la prelego de *s-ino Puff ÖSTLING* la publiko ekkonis la etan historion de la E-Domo en Lesjöfors, Svedio, kaj informiĝis pri la kursoj kaj la junular-gastejo.
Kvinpetalo, prezentita de *s-ro Brian MOON*, situas en vilaĝo je kvardeko da kilometroj de Poitiers, Francio. Ĝi disponas pri ĉirkaŭ 25 litoj kaj proponas trankvilan kamparan kadron por lerni kaj praktiki E-on. En la programo 2005 estas kursoj dum 12 semajnoj, ĉefe dum la periodoj de francaj lernejaj ferioj, kun ebloj eklerni la lingvon kaj ankaŭ studi ĝin je alta nivelo aŭ okupiĝi pri aliaj temoj pere de E-o. Kvinpetalo havas ankaŭ gravan bibliotekon, kun la postlasaĵoj de *Roger Bernard* kaj *Gaston Waringhien*.

3. Nuntempo kaj estonto de E-instruado en la mondo
Estis prezentitaj kelkaj novaj, relanĉitaj kaj jam sukcese funkciantaj projektoj kaj planoj tra kiuj la novaj teĥnikaj rimedoj, ĉefe la interreto, kontribuis pozitive kaj signife al la disvastigo kaj instruado de E-o. La porinstruista rethejmo *www.edukado.net* redaktata de *s-ino Katalin KOVÁTS* ekde julio 2005 havas novan profilon. Aldoniĝis pluraj sekcioj kun pliaj servoj (ekz. LEGEJO kun pedagogiaj artikoloj kaj dokumentoj, METIEJO - spertinterŝanĝejo por la instruista laboro ktp). La plej praktikan helpon daŭre donas la tiel nomata LERNILOTEKO, kies pli ol 300 ekzercojn oni elŝutis jam 33mil fojojn. Pluraj novaj administraj reguloj permesos pli personaligi informojn pri la membroj kaj krei veran retan renkontiĝejon kaj kunlaborejon. La reta komunumo de *edukado.net* jam havas 650 membrojn el 70 landoj. *[Redaktofine 756 el 78 landoj - NdlR]*
S-ro Stanislavo MANDRAK prezentis la aktualan funkciadon kaj evolu-planojn de *lernu!* kaj NESTO. La retpaĝaro *www.lernu.net* estas multlingva interaktiva platformo por lernado de E-o kaj informiĝo pri ĝi. Momente ĝi i.a. enhavas 12 diversspecajn kursojn, amuzan lingvoprezenton, ludojn, ekzercojn, literaturon, gazetojn, muzikon, filmetojn en E-o, diversajn

vortarojn, sondosierojn, regulajn virtualajn lecionojn en virtuala klas-ĉambro kaj tujmesaĝilon. Ĝi funkcias en 25 lingvoj kaj estas tradukata al pluraj aliaj. Pli ol 15.000 personoj registriĝis ĉe la paĝaro ekde fino de 2002 kaj ofte estas pli ol 50 samtempaj uzantoj.

La interreta projekto NESTO havas multnacian kunlaborantojn por mal-ĉeesta instruado de E-o laŭ pariga sistemo lernanto-instruisto. Sekvante la konceptojn de *Manifesto de Prago* kaj de la UN/Uneska agado *Kulturo de Paco kaj Senperforto* en kiu ankaŭ UEA kaj ILEI partoprenas per siaj projektoj, NESTO celas plibonigi la esperantistan aktivecon tra la diversaj mondregionoj, ĉefe kie esperantistoj malmultas kaj kie ne ekzistas fizike instruistoj. Radio NESTO estas ĉiam kaj ĉie disponebla tra la interreto kiel sona parto de la instrumetodo.

S-ino Mireille GROSJEAN parolis pri novaj planoj en La Chaux-de-Fonds. La Svisa ILEI-Sekcio kunlabore kun ILEI kaj UEA anoncis la okazigon de tutmonda konferenco pri instruado de E-o. Claude Gacond kaj Mireille Grosjean invitas la kolegojn al la konferenco kunlabore kun ŝtataj instancoj, inter aliaj kun la Instrudepartemento de la Kantono Neuchâtel, la Haute Ecole Pédagogique BEJUNE, l'Institut Romand de Documentation Pédagogique, la Conférence Intercantonale de l'Instruction Publique CIIP.

La Interlingvistikaj Studoj en la Universitato Adam Mickiewicz, Poznan, okazas daŭre ekde la studjaro 1998/99 kiel 3-jara ekstera postdiploma studado pri interlingvistiko sub la gvido de *s-ino Ilona KOUTNY* kaj internacia instruista stabo. Studentoj el 9 landoj finis kaj estas finantaj siajn studojn ĉi-jare. La studoj konsistas el enkonduko al ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, el internacia kaj interkultura komunikado, traktas planlingvojn kaj detale okupiĝas pri gramatiko, literaturo, kulturo kaj historio de E-o. En la tria jaro eblas specialiĝi i.a. pri metodiko. La unusemajnajn intensajn sesiojn (unufoje dum la semestro) sekvas hejma laboro kaj reta konsultiĝo kun la prelegantoj.

S-ino Katalin KOVÁTS prezentis la plej novan eldonaĵon de E@I kaj ILEI titolitan *Manlibro pri Instruado de E-o*, kiun kunverkis internacia teamo de 13 aŭtoroj kadre de la projekto *Flugiloj de Malfacila Vento.* La celo de la projekto estis provizi al – precipe junaj – instruantoj de E-o metodikan trejnadon kaj praktikan subtenon. Kelkaj seminarioj okazis kadre de IJK, ILEI-konferenco kaj kiel apartaj aranĝoj gvidataj de pluraj spertaj E-instruistoj kaj metodikistoj. La kreado de la Manlibro disvolviĝis tra la reto en 2004, pere de 'vikia redaktado'. La kunmetitaj artikoloj bezonis stilan, enhavan kaj formalan unuecigon, reordigon kaj kompletigon. La unuan

PDF-version redaktis kaj provis dum sia seminario *Stefan MACGILL* en la somero 2004. La paperan eldonon redaktis *Katalin KOVÁTS*. Per la prelego en TdL ŝi klarigis la principojn, ebligis enrigardon malantaŭ la redaktorajn kulisojn, sed ĉefe konigis la verkon kaj komprenigis ties strukturon kaj uzeblojn. Dum la aranĝo eblis aĉeti la libron rabatpreze.

4. Ekzamenoj

La ĉeestantoj ricevis superrigardon de ŝtata lingvoekzamena sistemo de Hungario kaj ekkonis novajn iniciatojn de ILEI rilate la eŭropnivelan harmoniigon de lingvaj normoj kaj akceptigon de E-o. *S-ro Iván BUJDOSÓ* prelegis pri la rezultoj kaj problemoj de la plej granda hungara ŝtata lingvoekzamenejo, en kiu E-o okupas la trian lokon laŭ la nombro de sukcesintoj.

S-ino Katalin KOVÁTS prezentis la gravan dokumenton nomatan *Eŭropa Lingva Dokumentujo* kaj klarigis ĝian enhavon kaj avantaĝojn. Ŝi skizis perspektivojn por krei modelon de *Eŭropa Lingva Dokumentujo por Esperanto* kaj akceptigi ĝin en la Konsilio de Eŭropo. La gravaj dokumentoj kiujn la preleginto tradukis en E-on estis disdonitaj kaj konsulteblas en la hejmpaĝo: *www.edukado.net*. ILEI kuraĝigos similajn klopodojn en aliaj mondopartoj – harmoniigi lernadon, instruadon kaj ekzamenadon de E-o laŭ oficialaj kriterioj kaj normoj por fremdlingva lernado, instruado kaj taksado validaj en koncerna lando aŭ regiono. Pri la sama temo pliajn informojn donas la artikolo de R. Petrović *Lingva kompetento kaj ĝia taksado*, IPR 2005/3, p. 3-7.



Hungaraj pedagogoj dum UK 2005 (de maldekstre): KÓRÓDY Zsófia, BUJDOSÓ Iván, H. HORVÁTH Judit, S. ZENGŐ Enikő, KOVÁTS Katalin kaj KOUTNY Ilona

Belgio

Metodika seminario kun Katalin KOVÁTS (28-30.11.2005)



La programo komenciĝis jam vendredvespere en la Antverpena E-klubo *La Verda Stelo* per la prelego pri Andreo Cseh okaze de lia 110-jara naskiĝdatreveno. La vesperon partoprenis kaj la seminarianoj kaj klubanoj, entute ĉ. 30 esperantistoj.

Katalin prezentante la faman E-pedagogon rakontis pri multaj nekonataj, foje kortuŝaj faktoj el la privata sfero de la vivo de Cseh. La ĉeestantoj povis vidi ankaŭ malgrandan ekspozicion kun multnombraj fotoj kaj eksposedaĵoj de Andreo Cseh, ekz. lian junaĝan memorlibron, aliajn personajn objektojn, familiajn fotojn kaj dokumentojn. La interesuloj povis aĉeti ankaŭ la surmerkate elĉerpiĝintan libron *Memorlibro omaĝe al Andreo Cseh*, verkitan de la prelegintino antaŭ 10 jaroj. La tutan sabaton de la 10a ĝis la 19a horo kaj dimanĉon inter la 13a kaj 19a horoj la 12 partoprenantoj povis kleriĝi kaj spertiĝi pri diversaj temoj el kiuj ni listigas sube kelkajn.

Danke al la surloka retkonekto oni povis havi informojn kaj instruojn pri la nova versio de *www.edukado.net*. Tiu trejnado estis utila malgraŭ tio, ke pli ol la duono de la ĉeestantoj jam estis membroj de la retejo. Kadre de la seminaria programo oni lernis pri instrumetodoj (historia trarigardo) kaj precipe pri specifaj E-metodoj. Por ke la instruantoj povu kompreni la instrumetodojn, Katalin ne nur teorie transdonis konojn, sed gvidis ankaŭ plurajn aktivaĵojn, donante eblojn al la partoprenantoj mem sperti la efikon de paroligaj ekzercoj, gramatikaj prezentaĵoj (inter aliaj pri amuza kaj efika instruado de refleksivo). Sukceson havis ekzemple ŝia porinstruista rolludo de serĉado kaj vendado de instruhelpiloj. La kolegoj povis admiri ŝian riĉan ‘instruistan kofron” (kopienda kaj imitenda instruhelpilaro en kvanto de pluraj kofroj kaj kestoj) kies kreado bezonis certe plurjaran laboron. Gravan rolon ricevis ankaŭ la *Eŭropa Lingva Dokumentujo* kaj ties utilo, diversaj

instruhelpiloj kaj taksosistemoj, testoj (ankaŭ amuzaj). La publiko ŝatis ankaŭ la prezentitajn erojn de la instrufilmo *Pasporto al la tuta mondo*.
La tutan seminarion trateksis la prezento kaj aludoj al la ĵus eldonita *Manlibro pri instruado de E-o*, redaktita de Katalin. La partoprenantoj povis aĉeti kaj tiun helpilon kaj plurajn aliajn en la libroservo de la *Flandra E-Ligo*, kiu situas en la sama konstruaĵo.
Krom la entute 17-hora lernado kaj trejniĝo la seminarianoj – pluraj venintaj el diversaj partoj de Belgio – dimanĉmatene povis fari 2-horan kulturan serĉpromenon tra la urbo Antverpeno.
Post la fino de la bonetosa programo, kiun agrabligis ankaŭ per bongustaj manĝaĵoj kaj bona zorgado la organizantino, ĉiu partoprenanto persone dankis al Katalin pro la tre lerniga semajnfino kaj ni ĉiuj konstatis, ke la daŭriga seminario devas esti organizota.

Iwona Kocięba, organizanto

Burundio

La plej juna instrukapabla esperantisto Gilbert Niyukuri



Revenante el Afriko, mi deziras fari unue nur koncizan raporton. Entute dum 5-semajna instrulaboro mi havis 163 seminarianojn. El ili la plej gravaj estas tiuj, kiuj faris ekzamenon pri instrukapablo. En ĉefurbo Bujumbura, 18 kaj en urbo Rumonge, 13, do ni havas en Burundio 31 novajn instrukapablajn Esperantistojn, kiuj povos porti la torĉon kaj daŭrigi la instrulaboron. 38 da ili estis en progresanta grupo kaj 94 estis komencantoj, kiujn povas instrui daŭre al la novaj kapabluloj. Ĉiuj el ili promesis fari tion en la propra urbo kaj regiono. La seminario estis internacia: el Kongolando venis 12 homoj kaj el Tanzanio 4. Aliaj estis el Burundio.
La plej entuziasma estis la kandidato, kiu havas 14 jarojn kaj nepre deziris fariĝi instrukapabla. Unue mi hezitis, sed kiam li enmiksiĝis en la instruon de alia kandidato kun vortoj „amiko, vi ne povas uzi akuzativon post prepozicio", mi vidis, ke li eĉ konas „la fakesprimojn" de la gramatiko. Finfine kiam li faris la ekzamenon, li kantigis la lernantojn kun kanto pri numeraloj, kiun li mem elpensis kaj li kantante instruis tion. Mi diris al li: „Vi ne povas esti instruisto, ĉar vi estas tro juna". Li ege triste respondis:

„Mi deziras instrui miajn kamaradojn en mia klaso, kaj jam promesis al ili fari tion ekde septembro, ĉu tio ne eblos, kaj mi lernegis dum tuta somero?" Post tio kaj post la skriba ekzameno, kiun li faris perfekte, la trikapa ekzamena komisiono decidis, ke li estu la plej juna instruisto en Afriko kaj eble en la mondo. *Tereza Kapista, <terezesp@EUnet.yu>*

Germanio

Pedagogiaj Tagoj en Herzberg

La Unuaj Pedagogiaj Tagoj estis komune organizitaj de Germana E-Asocio (GEA) kaj ILEI. La aranĝo sukcesis altiri pli ol kvardek fakulojn al Herzberg am Harz komence de oktobro. Du partoprenintoj venis el eksterlando (Hungario kaj Italio), la ceteraj el preskaŭ ĉiu parto de Germanio. La densa programo disvolviĝis tra tri tagoj, kun dek-kvino da referaĵoj kun diskutado pri plej diversaj aspektoj de instruado. La partoprenantoj devis elekti el inter tri paralelaj ses-horaj kursoj: de *Sabine Trenner* pri Cseh-instruado, *Stefan MacGill* pri situacia instruado kaj *Alfred Schubert* pri informado. Krome okazis forumo, praktikaj dismontroj de instru-helpiloj, aŭkcio de E-libroj kaj vesperoj plenaj je kulturo kaj amuzo.



Dek kandidatoj prezentis sin por la lingvo-ekzamenoj de Germana E-Instituto, kun ekzamenintoj *Gerald Tucker, Zsófia Kóródy*, kaj *Peter Zilvar*. Notinde, ke ok el la dek prezentis sin por la nove lanĉita supera nivelo. Paralele kun la aranĝo kunsidis la estraro de GEA, kio permesis altiron de kelkaj valoraj kontribuaĵoj al la faka programo. La urbestro de Herzberg laŭde salutis la aranĝon, rakontinte pri la urbo kaj pri ĝemelurba projekto kun Góra en Pollando, kiu evoluas kun E-o kiel la ponta lingvo.
Dum la aranĝo okazis organiza sesio por plani la reaktivigon de la landa sekcio de ILEI en Germanio, AGEI. Klaras ke multaj instruistoj ekzistas kaj agas en Germanio, sed ekster la kadro de AGEI. La kunsido nomumis kvarpersonan laborgrupon por akiri la membroliston kaj statuton de AGEI, kaj surbaze de tiuj kunvoki jarkunvenon, kun novaj elektoj dum la Germana E-Kongreso en Braunschweig en junio 2006. La laborgrupo kunordigos la aktivecon de la kunvenintoj intertempe. Pluraj ĉeestintoj aliĝis al ILEI por ne atendi la formalan restarigon. Entute, bonetosa sed samtempe laboriga aranĝo, kiun oni volas organizi ĉiujare ekde nun.

Pli da informoj:
<*esperanto-zentrum@web.de*> kaj *www.esperanto-zentrum.de*

Japanio

Intensiva kurso por meznivelulo

Stud-eduka fako de Japana E-Instituto (JEI), kiu donas la japanan sekcion de ILEI, okazigis intensivan kurson por meznivelulo de la 23-a ĝis la 25-a de septembro en E-Domo de Yatugatake, propraĵo de JEI. En ĝi partoprenis 20 homoj inkluzive de la du gvidantoj, KAWANISI Teturou kaj USUI Hiroyuki.



Ni dividis la partoprenantojn en du grupojn kaj ambaŭ gvidantoj instruis interŝanĝante du klasojn po sep horoj. En la klaso de KAWANISI (*Kio estas la kondiĉo por bela parolo E-a*?) klasanoj, uzante la teksto n de la parolado de Zamenhof farita en la Guildhall okaze de la 3-a UK,

mem voĉlegis la tekston kaj provis plibonigi sian parolon. Alia klaso (*Unue aŭskultu, nur poste parolu*) de USUI postulis, ke klasanoj legu antaŭe abundajn japanlingvajn tekstojn seriozajn kun temoj i.a. pri E-o kaj interkultura komunikado. En la klaso USUI prelegis nur E-e pri la samaj temoj. Al multaj japanoj mankas la kapablo konversacii pro granda malsameco inter la japana lingvo kaj E-o, do la gvidanto emfazas, ke la kapablo aŭskulti devas anticipi la aliajn. Malgraŭ, ke la klasanoj ne ĉion komprenis, la kurso donis grandan stimulon al ĉiuj.
En 2007 la 92-a UK okazos en Yokohama. Japanaj esperantistoj bezonas multe pli bone interkomunikiĝi kun alilandaj esperantistoj. Ni do planas kelkajn pliajn intensivajn kursojn ĝis Yokohama UK.

ISIKAWA Tieko, sekciestro
<isksanjo@ff.e-mansion.com>

Usono

NASK Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto
North American Summer Esperanto Institute

La sekvontjara trisemajna intensa **Nord-Amerika Somera Kursaro** (NASK) okazos denove en Brattleboro, **Vermonto inter la 3-21 julio**. La trinivelajn kursojn gvidos Katalin Kovats (HU/NL), Sylvain Lelarge (FR/NL) kaj Lee Miller (Usono). Krom la jam tradiciaj programoj kaj aranĝoj oni ebligos ekz. lingvoekzercojn bazitajn je arto-kurso; spertojn pri cerbamika instrumetodo, perkomputilan lernadon kaj konstantan eblon uzi la lingvon en internacia medio. Detalojn serĉu inter la kursoj ĉe *www.edukado.net* aŭ petu de Ellen Eddy (*eddyellen@aol.com*), kiu respondecas ankaŭ pri subvencioj.

Leterkesto

El la mesaĝo de UEA-Prezidanto al Radojica Petroviĉ: „mi skribas nur por gratuli vin, mi ne scias kiun, sed plurajn el vi pro la numero 05/3 de IPR. Mi ĵus legis ĝin kaj ĝi estas pli atentokapta ol normala revuo de pedagogiistoj estas. Mi kredas, ke la temo "modernigo de la ekzamensistemo", pritraktata en ĝi, estos unu el viaj ĉefaj temoj dum la venonta estrarkunsido. Bonan s'ancon!”

Renato Corsetti, Prezidanto de UEA

Juna amiko unujaras novoveste

Juna amiko finas sian unuan jaron de aperado laŭ la nova ofteco kaj skemo. Aperis du 52-paĝaj numeroj, kaj tria aperos ĝis la jarfino. La revuo havas novan tipografion kun materialo malpli dense sur la paĝoj. Aperis nova rubriko pri la projekto Interkulturo (red. *Lena Nadikova*, Rusio), kaj pli granda sekcio por etaj infanoj (*Mónika Molnár,* Svisio). Ĝi havas kvar plenkolorajn kovril-paĝojn.

Komence de 2005 ni altigis la plentarifan abonkotizon de 12 al 14 eŭroj por kovri la ampleksigon. Tio, kaj la manko de aparta varba prizorganto, rezultis en ioma falo en la abon-ciferoj: ĝis nun 750 por 2005 kompare kun 829 en 2004. (356 kaj 344 plentarife, 250 kaj 272 rabat-tarife). Elstaraj landoj estas (*2005,2004*) Italio (78,76), Hungario (64,72), Kroatio (67,67), Finnlando (50, 58) kaj Francio (54,69).

	1 ekz.	**Ekde 3**
Tarifo 1	€ 14	po € 11
Tarifo 2	€ 9	po € 7

Ni nomumas novajn perantojn en Nederlando (IEI) kaj Britio (David Kelso), kaj atendas pli da abonoj el tiuj landoj en 2006. Entute 2005 estis transira jaro; en 2006 ni planas kaj atendas pli fortan rezulton: la redakcio, eldon-ritmo, amplekso kaj abonkotizoj restos senŝanĝaj. Vidu la liston de perantoj ĉe *www.junaamiko.inf.hu*. Vizitu la enhavan hejmpaĝon en la biblioteko ĉe *www.lernu.net*, kaj aliĝu al *www.edukado.net* por doni viajn komentojn en la aparta sekcio METIEJO, subtemo *Juna amiko*.

Infanaj Kongresetoj – inta, onta, unta

Litova feriejo Pailgis gastigis la Infanan Kongreseton en 2005, kun 40 infanoj kaj 7 gvidantoj. Tiuj venis el 13 landoj, inkluzive de Kanado, Kazaĥio kaj Japanio. UK provizis la kongreseton per aparte riĉa kultura programo, kun du-foje 50-kapaj ĥorusoj. Naĝado, promenado, kantado, manlaboroj, akvo-biciklado kaj sporto plenigis la tagojn. Foto-galerio videblas ĉe: *http//bertosch.free.fr/iik2005fotoj/index.html*.

En 2006 invitas al IIK (Internacia Infana Kongreseto) la itala urbo Prato, 20 km. de Florenco. Ĝi okazos en kooperative prizorgata junular-gastejo posedata de la urbo. La feriejo troviĝas rande de la urbo (facile atingebla), ĉirkaŭata de urba parko, kun apuda monteto (420m) kaj besto-flegejo. Prato mem havas historian centron (kaj publikan naĝejon); Florenco apudas; la

planata ekskurso-celo estas infan-parko Pinokjo, en urbeto Kollodi (Collodi), kie naskiĝis la patrino de la verkinto Karlo (Carlo) Lorencini. Alvenis pluraj interesiĝoj; aliĝilo kaj informilo estos dissenditaj per Juna amiko 2005/4 jarfine. La atendata meza kotizo por plene zorgata 7-taga restado estas 285 eŭroj (mildigebla per frua aliĝo). Kial titole 'unta'? Jam okazas sondoj pri la eblo okazigi IIK en Japanio en 2007. Sen-mem-devigaj anonciĝoj de partopren-pripensoj helpus al ni decidi favore.

Stefan MacGill

Komitatkunsido de FIPLV

François LO JACOMO reprezentis ILEI en komitatkunsido de FIPLV, (Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj – *www.fiplv.org*), kiu okazis en Parizo la 24-an kaj 25-an de septembro 2005. FIPLV estas Ne-Registara Organizo en operaciaj rilatoj kun UNESKO; en ĝi membras kelkdek landaj (instruistoj en unu lando) kaj fakaj (instruistoj pri unu lingvo) asocioj, kaj ILEI estas unu el tiuj ĉi fakaj (unulingvaj) asocioj. Ĉeestis nur ok homoj, en agrabla etoso, kie Esperanto estis egalrajta kiel aliaj lingvoj, kun pli ofta uzado de la angla lingvo, sed ankaŭ de la franca kaj germana. Dum sia venontjara kongreso en Göteborg (15-17 junio 2006) FIPLV festos sian 75-jaran jubileon, kun ĉeftemo: diverseco en lingvo-lernado kaj instruado,



Surfote (de maldekstro): Cecila Odé (Nederlando), estrarano pri eldonaĵoj kaj reprezentanto de ruslingva asocio MAPRYAL, François Lo Jacomo (Francio), Hélène Ladevie (Francio), reprezentanto de gastiganta franclanda asocio APLV, Eynar Leupold (Germanio), ĝenerala sekretario, Jan Robertson (Nov-Zelando), estrarano pri financoj, Peter Ehrhard (Svislando), reprezentanto de franclingva asocio FIPF kaj Denis Cunningham (Aŭstralio), prezidanto.

Fotis: Lucka Pristavec, reprezentanto de germanlingva IDV

***

Ni ricevis la malĝojigan informon pri la forpaso de Raymond Wylleman, la estro de belga ILEI-sekcio kaj respondeca eldonanto de nia revuo. La redakcio en la sekva numero adiaŭos lin.

La 39-a Konferenco de ILEI en Parmo, Italio
25 - 29 julio 2006

Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj

Konferenca temo: Subteno al lingvaj rajtoj kaj lingva egalrajteco, progresigo de lingvolernado kaj edukado por ĉiuj estas ekzistokialoj de ILEI kaj gvidideoj de ĝia agado. Tiuj ideoj estas kernaj ankaŭ por la homaj rajtoj kaj homara evoluo pri kiuj UN kaj UNESKO tiomfoje deklaraciis kaj rezoluciis. En tiu kunteksto la ĉeftemo de la 39-a Konferenco de ILEI – *Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj* – prezentas strategian kadron de ILEI-agado. Ĝi celas pensigi pri kaj instigi al:

- plia popularigado, disvastigado kaj utiligado de E-o kiel ilo de la kulturo de paco,
- plialtigo de la kvalito de E-instruado,
- trovado de E-movadaj kaj ekstermovadaj partneroj por edukprojektoj de ILEI,
- instruado de E-o kiel formo de sociigo kaj edukado al diverseco.

La konferenca temo ne estas nur konferenca slogano kaj ornamaĵo. Ĝi estas motivigilo kaj gvid-ideo por niaj debatoj kaj agadoj. Ĉiuj kiuj havas ion por diri pri ĝi bonvolu proponi prelegon por la simpozio pri konferenca temo antaŭvidita en la konferenca programo. Ĉiuj kiuj havas ideojn pri eduk-projektoj rilate al la konferenca temo, venu al la Konferenco por trovi projektpartnerojn.

Konferenca urbo: Je la suda rando de Padio, najbare al la montetoj de Apeninoj, situas la urbeto Parmo. La saman nomon portas la rivereto, kiu malsupreniras de la Apenina montoĉeno kaj dividas la urbon en du partojn. La urbon fondis etruskoj kaj okupis ĝin tribo de gaŭloj antaŭ la alveno de romianoj kiuj, en la jaro 183 a. K., koloniigis ĝin. Parmo estas ja unu el la 8 fortikaĵoj konstruitaj de romianoj laŭlonge de la Emilia Vojo. En la urbo restas ankoraŭ historiaj monumentoj kaj de Romia kaj de mezepoka periodoj. Elstaras certe du mirindaj romanikaj konstruaĵoj kiuj ĉiam altiras multe da turistoj kaj artŝatantoj: la Katedralo kaj la Baptejo [← *vd. la foton maldekstre*].



Parmo estas atingebla per aviadiloj (la flughaveno nomiĝas „G. Verdi“), aŭtovojoj (aŭtovojo nr. 1 aŭ „aŭtovojo de la suno“ kaj nr. 15 Parma – La Spezia), per ŝtataj fervojoj (Milano – Bologna, Brescia

– Parma, La Spezia – Parma) kaj per normalaj vojoj. La flughaveno „G. Verdi“ situas 3 km for de la stacidomo (atingebla per urba buso nr. 6). La ĉefa estas la flughaveno de Bolonjo, tamen tre taŭgas ankaŭ Milano Linate kaj Milano Malpensa. Pluraj malaltkostaj flugoj atingas la flug-havenon de Orio al Serio kun flughavenbuso al Milano Centra Stacidomo (Milano Stazione Centrale) aŭ al Forli (kun urba busa konekto al la stacidomo de Forli).

En Parmo haltas lokaj (L), regionaj (R), interregionaj (IR), interurbaj (IC) kaj superrapidaj (ES) trajnoj. Ankaŭ internaciaj buslinioj alvenas kaj haltas antaŭ la stacidono. Pli detalaj informoj aperos en la dua bulteno.

Vetero: La temperaturo atingas 30-34 celsiajn gradojn, tre malofte pluvas. Kunporti jaketon por la plej freŝaj noktoj konsilindas.

Elektra kurento: La elektra tensio estas 220-volta. La kontaktingoj estas dupolusaj kaj taŭgaj por platformaj (foje) aŭ por rondformaj kontaktiloj. Konsilindas havi adaptilon por uzi viajn alportitajn aparatojn.

Alveno: En la stacidomo de Parmo la 25-an de julio deĵoros samideano kiu indikos, kiel atingi la konferencejon aŭ la aliajn tranoktejojn. Vojaĝo per urba buso (ĝis maksimuma daŭro de 1 horo) kostas € 0,80. Ekzistas bileto je la prezo de € 6,00 kiu estas 8-foje uzebla.

Manĝoj: Oni povas antaŭmendi tagmanĝon aŭ vespermanĝon kontraŭ la pago de 10,00 eŭroj en la konferencejo aŭ manĝi memstare.

Monŝanĝo: En Italio oni uzas eŭrojn. Internacie konverteblajn valutojn eblas ŝanĝi en bankoj, poŝtoficejoj kaj grandaj hoteloj. Krome, ekzistas monaŭtomatoj en ĉiuj flughavenoj kaj multloke en la urbo. Ne ŝanĝu monon en neoficialaj monŝanĝejoj!

Sanservoj: Medicinaj servoj de pluraj landoj havas kontraktojn kun Italio, surbaze de kiuj eksterlandanoj povas uzi la samajn servojn kiel enlandaj loĝantoj. Bonvolu mem kontroli, ĉu via lando havas tian kontrakton kaj sub kiuj kondiĉoj.

Sekureco: En Parmo kaj en aliaj urboj necesas singardemo pri mono kaj havaĵoj.


Programo: Por la konferenco oni antaŭvidas: inaŭguron, Lingvan Festivalon (la 28-an de julio posttagmeze), unutagan Simpozion laŭ konferenca temo (la 27-an de julio – tutan tagon), komitatkunsidojn (la 26-an kaj 28-an antaŭtagmeze), paralele proponitajn prelegojn de niaj samideanoj kaj invititaj gastoj, paralele seminarion de E-literaturo kaj seminarion de Interkulturo aparte pagendan bankedon (la 28-an de julio – adiaŭan komunan vesper-manĝon en lukseca etoso). Informoj pri eventualaj aliaj seminarioj aŭ programeroj kaj iliaj kondiĉoj aperos en venontaj IPR kaj ttt-ejo de ILEI. Pli preciza programo estos dessendita al aliĝintoj en dua bulteno fine de marto.

Bonvolu neniam skribi al la konferencejo, sed nur al la estrarano pri konferencoj: *Aida Čižikaitė, Zamenhofo 5, LT-44287 Kaunas, LITOVIO; aidute@mail.lt; tel. +370 37 208503, faks. +370 37 209145, portebla +370 616 15991* kaj la loka ĉeforganizanto *Luigia Oberrauch Madella via Prampolini 8, 43100 Parma, ITALIO; silkovojo@aliceposta.it, tel/fakso +39 0521 785582*

Konferencejo kaj tranoktejo:
La konferenco okazos en la *Istituto Salesiano San Benedetto,* placo San Benedetto 5, apud strato A.Saffi. Ĝi situas en la urbocentro ne malproksime de la katedralo kaj de la *Monaĥejo "Monastero San Giovanni*", ĉirkaŭ 20 minutojn piede de la stacidomo.
Por tranokti ekzistas jenaj eblecoj:
– *Hotelo Lazzaro* situanta en la malnova urbo (strato XX Marzo nr.o 14) je 10 minuta piedira distanco de la konferencejo, proksime de la Baptejo, en trankvila, piedira parto de la urbo. Ĝi estas malgranda, kvieta kaj bone ekipita kun lifto. La matenmanĝo ne estas inkluzivita. *Prezo por nokto: loko en 1-lita ĉambro sen enĉambra banejo € 40,00; loko en 1-lita ĉambro kun enĉambra banejo € 52,00; loko en 2-lita ĉambro kun enĉambra banejo € 38,00.*
– *Hotelo Moderno* situanta apud la stacidomo en strato A. Cecchi 4, je 20 minuta piedira distanco de la konferencejo. Ĝi estas moderna, pura kaj bone ekipita hotelo kun lifto. *Prezo por nokto: loko en 1-lita ĉambro sen enĉambra banejo € 58,00; loko en 1-lita ĉambro kun enĉambra banejo € 75.00; loko en 2-lita ĉambro sen enĉambra banejo €40,00; loko en 2-lita ĉambro kun enĉambra banejo € 40,00. Matenmanĝo por persono € 9,00.*
– *Restadejo Edison (Ostello Foresteria Edison*), largo 8 Marzo 9/a. Ĝi situas en trankvila loko je la okcidenta rando de la urbo kaj estas atingebla per la aŭtobusoj nr. 2 kaj 13 ĉiujn 15 minutojn. *Prezo por 1 nokto por 1 persono: loko en 3 trilitaj ĉambroj je € 21,00, loko en 1 trilita granda ĉambro je € 29,00; loko en 2 dulitaj ĉambroj je € 29,00 kaj loko en 1 kvarlita vasta ĉambro je € 29,00.* Matenmanĝo inkluzivita. La ĉambroj situas en teretaĝo kaj havas duŝejon kaj necesejon. Necesas kunporti bantukon.
– *Monaĥejo (Monastero) San Giovanni Evangelista*, placo San Giovanni, 1. Ĝi estas tre malnova, freŝa kaj pura loko kun lifto je 5 minuta piedira distanco de la konferencejo. *Prezo por nokto: loko en unulitaj ĉambroj je € 23,00 por persono*. Matenmaĝo ne inkluzivita. La gastoj rajtas uzi komunan kuirejon.
– *Comitato Anziani Pablo Golese "Il Tulipano",* via Bonomi 23/A. Ĝi estos atingebla per urba aŭtobuso de la stacidomo. En vasta ĉambrego (sen lifto) estas loko por 4 litoj. Ankaŭ eblas dormi surplanke en dormosakoj aŭ sur matracoj. Ekstere de la domo troviĝas bone lumigata parkejo por ruldomoj aŭ tendoj. Ĉiuj gastoj rajtas uzi la endomajn duŝejojn, necesejojn, kuirejon kaj manĝosalonon. *La prezoj por unu nokto kaj persono € 6,00* en la ĉambrego; *por 1 ruldomo aŭ tendo por nokto € 6,00*; por dormi en dormosako aŭ sur matracoj *por 1 persono kaj nokto € 3,00.*
– *Istituto Salesiano San Benedetto*, placo San Benedetto 5, apud strato A. Saffi. Unulitaj aŭ dulitaj ĉambroj, kies duŝejoj kaj necesejoj estas sur la koridoro. La domo havas lifton. Matenmanĝo inkluzivita. *La prezo por unu nokto kaj persono € 21,00.* Eblas antaŭmendi tagmanĝon/vespermanĝon je la prezo de *€ 10,00*.

Vojaĝo de Parmo al Massa kaj poste al Florenco la 29an de julio:
Estas du eblecoj: buse kaj trajne. Ambaŭ havas siajn avantaĝojn kaj mal-avantaĝojn. La trajnlinio Parmo-La Spezia/Massa (129 km) estas tre pitoreska. Ĝi sekvas valon de la rivero Taro ĝis Borgo Val di Taro kaj poste eniras longajn tunelojn por ekaperi post la montoĉeno de la Apeninoj. Oni jam troviĝas en la Ligura regiono en kiu abundas vinberejoj kaj olivarboj. Najbare al La Spezia montriĝas la mirinda samnoma golfo kaj nun la trajno kuras inter la marbordo kaj tre karakterizaj montoj, la *Alpi Apunane* kiu donas la mondfaman blankan marmoron de Carrara. Massa troviĝas je la piedoj de tiuj ĉi montoj.
La trajnvojaĝo inter Massa kaj Florenco longas 123 km (en Pisa oni devas ŝanĝi trajnon.) Trajnbileto por vojaĝo Parma – Florenco kostas *€ 13,00*. En Massa eblas viziti E-bibliotekon.
Se aliĝos ne malpli ol 30 personoj, eblos aranĝi komunan **busvojaĝon** al UK kaj survoje viziti E-bibliotekon en Massa. Ĝi kostos ne malpli ol *€ 30* popersone, depende de la nombro de aliĝontoj, sed malaperos devo ŝanĝi trajnon kaj zorgoj pri pakaĵoj survoje kaj dum vizito al biblioteko.

Duontagaj ekskursoj:
DT1: Parma kaj ĝiaj mezepokaj juveloj (la 25-an de julio, *posttagmeze*)**.** Dum la piedira vizito ni atingos la antikvan romian ponton el ŝtonoj, la Katedralon, la Baptejon, la klaŭstron de la sankta Johano kun ĝia pentrita biblioteko kaj la malnovan apotekon de la monaĥejo. *Prezo: € 12,00*
DT2: Parma kaj kelkaj el ĝiaj muzeoj (la 26-an de julio *matene)*: Altiras nin unue la granda Palaco della Pilotta kun sia arkeologia muzeo, kun la nacia Pinakoteko, la ligna teatro Farnese kaj unu el la plej gravaj urbaj bibliotekoj kiu nomiĝas Palatina. Poste ni povas elekti inter la muzeo Glauco Lombardi kiu enhavas la memoraĵojn de Napoleono kaj de lia dua edzino Maria Luigia d'Aŭstrio kies mildan regnon la Parmanoj multe ŝatis. Eblas viziti ankaŭ la ĉinan etnografian muzeon kiu riĉas je belegaj ekzempleroj de antikvaj vazoj kun la unuaj atestoj de la ĉina kaligrafio. *Prezo: € 14,00.*



DT3: Parma kaj famkonataj muzikistoj kaj verkistoj (la 27-an de julio *posttag-meze)***.*** En la provinco de Parma naskiĝis kaj loĝadis ĝis sia morto la plej granda lirika verkisto Jozefo Verdi [*vd lian monumenton dekstre*]. Multaj estas la lokoj en la urbo kiuj memorigas al ni la grandan estimon de la parmanoj por liaj lirikaj operoj kaj por la verkoj de aliaj muzikistoj kaj verkistoj inter kiuj estas ankaŭ Stendhal (kaŝnomo de la franca verkisto Henri Beyle), la aŭtoro de la fama romano *La kartuzio de Parmo*

(La Certosa di Parma.). Ni vizitos piede aŭ per urba buso la Citadelon kaj la parkon Sankta Paolo kies priskriboj aperas ankaŭ en la romano mem. *Prezo: € 15,00.*



DT4: Ekskurso al Kastelo Torrechiara (la 27-an de julio *matene)*. Ĝi estas unu el la multaj kasteloj de nia provinco kaj troviĝas je 15 km sude de la urbo sur ĉarma monteto meze de vinberĝardenoj kiuj produktas la Malvasia, faman kaj tre bongustan blankan vinon. La kastelo mem neniam vidis batalon aŭ konkeron, kontraŭe ĝi estis la luksa domego kiun donacis la feŭda sinjoro Pier Maria Rossi al sia amatino s-ino Bianca. La amhistorio de la paro estas bildigita sur la vandoj de la „Ora Ĉambro". Nuntempe en la eleganta kortego de la kastelo okazas someraj koncertoj kaj teatraĵoj. *Prezo: € 17,00.*

DT5: Ekskurso al Salsomaggiore (la 28-an de julio *posttagmeze)*. La celo de nia unuhora trajnvojaĝo okcidenten estas urbo de termofontoj kiuj situas inter la unuaj montetoj de la Apeninoj. Ĝi estas tre ŝatata kosmopolita loko kun multe da belaj vilaoj, elegantaj palacoj, modernaj hoteloj, ekskluzivaj vendejoj, ripozigaj parkoj kaj imponaj termofontaj kura-cejoj. *Prezo: € 17,00. [surfote: Palaco Berzieri→]*



<u>Bankedo</u>: komuna vespermanĝo en la manĝosalono de la instituto „Fratelli de la Salle" kiu troviĝas tute najbare al la katedralo, do je 5-minuta piediro de la konferencejo. *Prezo: € 25 por A landanoj kaj € 18 por B landanoj por persono.*

Por elekti la ĝustan kotizon, bonvolu atente legi la sekvajn klarigojn:

La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ jena grupiĝo:
A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.
B: Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko kaj Latinameriko.

Kotizoj en EUR validaj	*ĝis 31.03.06* (1-a periodo)	*ĝis 30.06.06* (2-a periodo)	*ekde 01.07.06* (3-a periodo)
Aliĝkategorio	A/B	A/B	A/B
1. Membro de ILEI	50/30	60/36	70/42
2. Ne ILEI-ano	55/35	68/44	80/52
3. Junulo, handikapulo	25/15	30/18	35/21

Kiun ajn vojon vi elektas por pagi, bonvolu informi la kasiston tuj kiam vi faras vian pagon: *Sjoerd BOSGA, Trådragargatan 27 D, SE-72337 Västerås , Svedio, sjoerd@esperanto.se*.

Bv. prefere aliĝi rete pere de http://ilei.info/konferenco/alighilo2006.php, ĉar tio helpas al organizantoj eviti erarojn kaj ĉiuj informoj, metitaj de Vi mem estas ĝustaj. Pliaj informoj kaj ĉiuj novaĵoj konsulteblas en retejo de ILEI http://ilei.info/konferenco/. Tie Vi trovos ankaŭ utilajn ligojn. Informojn pri Parma Vi povas trovi en http://www.comune.Parma.it.
Se Vi havas demandojn, bonvolu skribi al ILEI: info@ilei.info
Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la KOMPLETA pago ĉe la ILEI-Kasisto. Aliĝilo sen KOMPLETA pago ne estas traktata.

Difinoj
Membro de ILEI: tiu kiu jam pagis kotizon al ILEI por la jaro, kiam okazas la konferenco.
Junulo: tiu, kiu naskiĝis post la 31-a de decembro 1975.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Konferencon pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Konferenco ne okazas aŭ okazas en alia urbo. Ankaŭ malsaniĝo ne rajtigas je ajna repago, nek iu ajn alia kialo. La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn kaj eventuale aparte pagendajn aferojn, pri kiuj informoj kaj mendiloj aperis/os en IPR. La kotizo inkluzivas nenian asekuron. Bonvolu zorgi pri tio en Via lando.
Konferencaneco ne estas transdonebla al alia persono.
Por mendoj atingantaj nin post la 1-a de majo 2006 oni devas aldone pagi *€ 40,00*! Post la 1-a de junio 2006 ni ne plu povos por vi mendi tranoktejon. Se al ekskursoj aliĝos ne sufiĉa kvanto de partoprenantoj, ili povas esti nuligitaj. Kaze de malaliĝo plej malfrue unu monaton antaŭ la konferenco, la aliĝinto rericevos sian aliĝ-kotizon kaj 80 % de la pagoj (por la kovro de la organizaj kostoj), malaliĝante ĝis 14 tagoj antaŭ la konferenco estos redonata 60 % de la pagoj, sed ne aliĝkotizo, kaj pli poste la aliĝinto rericevos neniom.

Konferenca Regularo (*ekstrakto***):**
6. Konferencanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Konferencan Regularon aŭ malutilas al la ILEI-Konferenco kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas ILEI-Konferenco.
7. Ĉiu vendado de varoj en ILEI-Konferenco bezonas antaŭan aprobon de la Estraro, kiu starigas la kondiĉojn. Skriba peto pri tia agado estu liverita al la Estrarano pri Konferencoj nepre antaŭ la 30-a de junio de la konferenca jaro.

(Plie legeblas: http://www.ilei.info/dok/regularo_konferencoj.rtf?lingvo=eo)

LABORKOMISIONOJ

Azia agado: Rob Moerbeek

Ekzamena: Duncan Charters (prez.), Katalin Kováts (vicprez.), Bill Maxey (sekr.), Probal Dasgupta, Gbeglo Koffi, Mireille Grosjean

Elekta: Maritza Gutiérrez (kunvokanto), Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute

Kontrola: Ulla Luin, Bengt Jansson, anstataŭanto: Lars Forsman

Lerneja: Carola Antskog, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi

Regulara: Marija Beloševiĉ, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas

Terminara: Maŭro La Torre, Miroslav Malovec

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, *cantskog@kolumbus.fi*

E@I (*Esperanto ĉe Interreto*, *www.ikso.net*), faka sekcio de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, *www.tejo.org*, poŝtadreso ĉe UEA)

FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)*:
Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop**, *esperanto@Education.monash.edu.au*

IEI: *Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.*

UEA: *Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.uea.org*. A-komitatano el ILEI: **Atilio Orellana Rojas**. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Radojica Petrović**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**.

UNESKO (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: **François Lo Jacomo**, *72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr*; **Monique Arnaud**, *Ecole Chemin de l' Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@tiscali.fr*; **Jean-Pierre Boulet**, *17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60*; **Mireille Grosjean**, *Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, tel/fakso: (+41 32) 932 18 88, mireille.grosjean@rpn.ch*

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 4 EUR (A) kaj 2 EUR (B). Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al la kasisto de ILEI: **Sjoerd Bosga**, *Trâddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel.: (+46 21) 41 70 45, sjoerd@esperanto.se.*

La pagoj povas okazi pere de konto de ILEI ĉe UEA, aŭ al la sveda konto.

* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku vian nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).

* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Föreningssparbanken. El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.

Hejmpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona Kocięba, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem.*

Presado: Flandra Esperanto Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, tel: (+32-3)-234 34 00.*

Redaktejo: NÉMETH József, *HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5.* Rete: *http://www.ilei.info/ipr/; jozefonemeth@yahoo.com*, tel: *(+36-89) 356-050.* Vicred: *katalin@ikso.net.*

La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: *Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*. La nunan numeron ni sendis al la presejo la 15-an de novembro 2005, **redaktofino por la sekva numero: 15.01.2006**.

SEKCIOJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana, *selimibardhyl@yahoo.com*

Argentino: vakas

Aŭstralio: Penny Vos, 511 Wyndham Lane/Kanoona, Candelo NSW AU-2550, *penivos@yahoo.com*

Belgio: Iwona Kocięba, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem, *dirk.iwona@pandora.be*

Brazilo: Antonio Felix da Silva Rua Engenheiro Francisco Azevedo, 243, Sumarezinho - São Paulo – SP, BR-05030-010, *ileibr@linguauniversal.com.br*

Britio: Tellier Angela, 10 Marina Gardens, GB IP11 2HW Felixstowe, Suffolk, *angela@esperantoeducation.co.uk*

Ĉeĥio: Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratíškovice 938, *melicharkova@quick.cz*

Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan, *zdchen@public.wh.hb.cn*

Finnlando: Carola Antskog, Dragsfjärdvägen 690, FI-25700 Kimito, *cantskog@kolumbus.fi*

Francio: Joseph Catil, 5, rue des Calabres, FR-69330 Meyzieu, *joseph.catil@wanadoo.fr*

Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn

Hungario: József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, *jozefo.nemeth@gmail.com*

Irano: Hamzeh Šafii, P.O. Kesto 17765-184, IR-Teheran, *ilei.ir@esperanto.org*

Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma, *silkovojo@aliceposta.it*

Japanio: Isikawa Tieko, 103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama JP-353-0006, *isksanjo@ff.e-mansion.com*

Katalunio: Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2-4-2, ES-17300 Blanes, *ileicat@hotmail.com*

Korea Resp.: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon KR-402-751, *shcho@inha.ac.kr*

Kroatio/KEL: Marija Jerković, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, *mjerkovic@net.hr*

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb, *ilei_kroatio@teacher.com*

Kubo: Marta Alonso Gutiérrez, Malecón 659 entre Belascoaín y Gervasio; CU-10200 Ciudad de La Habana, *kubesp@enet.cu*

Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, *iei001@tiscali.nl*

Norvegio: Anne-Karin Bondhus, Baldersveg 3C, nr 17, NO-7033 Trondheim, *anne.k.bondhus@itk.ntnu.no*

Pollando: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow, *mmajerczak@gmail.com*

Rumanio: Mihai Trifoi, Bl. 1/ap.3, Jud. Covasna, RO-527118 Bixad, *trifoi@honoris.ro*

Rusio: Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000, *mirina@online.ru*

Svedio: Siv Burell, Lekstorpsv. 46 E, SE-443 41 Graabo, *siv.burell@telia.com*

Svislando: Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets *mireille.grosjean@rpn.ch*

Togolando: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO, *esp.togo@cafe.tg*

Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-43026, *nina_daniljuk@ukr.net*

Usono kaj Kanado: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US), *dorothyh@west.net*

Venezuelo: Andrés Turrisi, Cen.Res.Puerta del Este.Torre, Oeste, piso15, ap.153, Av.Madrid, VE-1070 La California Norte, Caracas, *andesp@internet.ve*

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, *LIDELB@freenet.am*

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenović, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000, *hecg@uea.org*

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, *loftur@skyrr.is*

Israelo: Gian Piero Savio, P.O.K.386, IL-84965 Omer, *gpsa@uea.org*

Kongo DR: Ngangu Nduantoni-Bakidila,B.P.13,CD-Lukala, Bas-Zaïre

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, *tikoguau@gmail.com*

Litovio: Algimantas Piliponis, Kavoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius, *piliponis@centras.lt*

Meksiko: José de Jesús Corrales C., Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo. *jdjcorrales@yahoo.com.mx*

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1, *gwenda.s@ihug.co.nz*

Portugalio: João Jose Santos, Apartado 123, PT-5301-902 Bragança, *joaojosesantos@gmail.com*

Serbio kaj Montenegro: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36, SCG-32000 Čačak, *radp@ptt.yu*

Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miličinskega 66, SI-1000 Ljubljana, *Marija.Zlatnar@guest.arnes.si*

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Počtamt, UZ-700000 Taškento, CIS, *esperuzo@mail.ru*